Driemaandelijks tijdschrift
Afgiftekantoor: Antwerpen X. ISSN 1013-2031

# IPR
INTERNACIA PEDAGOGIA REVUO

Jarkolekto 36 - trimonata
06/2

**Redakta komitato:**
Jozefo Németh (red.)
Luiza Oberrauch Madella
Rob Moerbeek
Iwona Kocieba

**Kunlaborantoj de la aktuala numero:**
Aida Cizikaite
Renato Corsetti
Probal Dasgupta
Mireille Grosjean
David Kelso
Zsofia Korody
Ilona Koutny
Katalin Kováts
Stefan MacGill
Maria Majerczak
Svetlana Mirosnicenko
Radojica Petrovic
Ileana Schroder
Zlatko Tisljar





ILEI
Organo de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj

## ENHAVO

*Antaŭkonference* (Radojica PETROVIĆ) ........ 3
Probal DAŜGUPTO: *Letero al pedagogoj* ........ 4
Renato CORSETTI: *Ĉu gravas pleje la baza lernejo aŭ la universitato?[...]* ........ 7
Svetlana MIROŜNIĈENKO: *Propedeŭtika valoro de E-o [...]* ........ 10
Zlatko TIŜLJAR: *Lernmotivoj kaŭzas kompetentecon* ........ 13
*Biografietoj de la membroj de Scienca Komitato (I.)* ........ 15
Mireille GROSJEAN: *Koncepto de instruprogramo* [eduko al kulturo de paco] .. 18
David KELSO: *Projekto Lingvolanĉilo* ........ 22
*Homa vivo kaj Loĝado* [rec. de Zs. KORODY pri la vortaro de I. KOUTNY]........ 25
*La 39-a Konferenco de ILEI* [pliaj informoj, Simpozio, Lingva Festivalo]........ 27
*El la landoj kaj sekcioj* [BI, DK, DE, PL] ........ 31
*Por via notlibro* [Juna amiko 2006 mult-kontinenta, E-o por Progresantoj, Ne forgesu nian ligan libroservon, TORPEDO 2 en Germanio] ........ 35

## ESTRARO DE LA LIGO

**Prezidanto**: Radojica Petrović, *Bul. oslobodjenja 36/14, SCG-32000 Čačak, Serbio. Tel. (+381) 32371053. Fakso: (+381 32) 342101, <radp@ptt.yu>*
Kunordigado, eksteraj rilatoj, la projekto InterKulturo.
**Vicprezidanto**: Stefan MacGill, *Pannónia u. 30. I/6, HU-1136 Budapest, Hungario. Tel. (+36 1) 349-5207, <Stefan.Macgill@gmail.com>*
Juna amiko, lerniloj.
**Sekretario**: Atilio Orellana Rojas, *Riouwstraat 172, NL-2585 HW Den Haag, Nederlando. Tel. (+31 70) 3556677, fakso: (+31 70) 358 4422, <ieі001@tiscali.nl>*
**Vicsekretario:** Aida Čižikaitė, *Zamenhofo g. 5, LT-44287 Kaunas, Litovio. Tel. (+370) 37 208503. <aidute@mail.lt>*. Konferencoj.
**Estrarano pri financoj**: Sjoerd Bosga, *Tråddragargatan 27D, SE-723 37 Västerås, Svedio. Tel. (+46 21) 41 70 45, <sjoerd@esperanto.se>*
**Estrarano**: Mauro La Torre, *Dipartimento di Scienze dell'Educazione, Università Roma Tre, Via Castro Pretorio, 20, IT-00185 Roma, Italio. Tel.: (+39) 06 44 62 092 aŭ 06 49 57 805, fakso: (+39) 06 49385673, <mauro.latorre@uniroma3.it>; http://host.uniroma3.it/docenti/latorre/*
Universitata kaj scienca agadoj.
**Estrarano:** Hokan Lundberg, *Fisksatra Torg 12, SE-133 41 Saltsjobaden, Svedio. Tel. (+46) 8 717 78 69,<hokan@ikso.net>*
Retprojektoj kaj junulara agado.

*Titolpaĝo: supre: Instruistinoj Anna Żyła kaj Aneta Pawlak (PL) ricevas taskon de lernantino (p. 34); sube: partoprenantoj de daŭriga kurso en Danio (p. 31)*



### *Scienca Komitato*

*Prezidanto*: **Humphrey Tonkin**, Usono, University of Hartford; AdE[1]
*Vicprezidanto*: **Detlev Blanke**, Germanio, Prezidanto de la Societo pri Interlingvistiko
*Membroj*:
**Vera Barandovská-Frank**, Germanio, Universität Paderborn, AIS[2] San Marino
**Duncan Charters**, Usono, Principia College, Elsah
**Renato Corsetti**, Italio, Università degli Studi di Roma "La Sapienza"; AdE[1]
**Probal Dasgupta**, Barato, University of Hyderabad; AdE[1]
**Michel Duc Goninaz**, Francio, Université de Provence; AdE[1]
**Aloyzas Gudavičius**, Litovio, Šiaulių universitetas
**Wim Jansen**, Nederlando, Universiteit van Amsterdam
**Boris Kolker**, Usono, AdE[1]
**Ilona Koutny**, Pollando/Hungario, Uniwersytet im. Adama Mickiewicza w Poznaniu; AdE[1]
**Mauro La Torre**, Italio, Università degli Studi Roma Tre
**Maria Majerczak**, Pollando, Uniwersytet Jagielloński w Krakowie
**Geraldo Mattos**, Brazilo, Federacia Universitato de Paranao; AdE[1]
**Aleksandr Melnikov**, Rusio, Академия Сельскохозяйственного Машиностроения
**Radojica Petrović**, Serbio kaj Montenegro, Univerzitet u Kragujevcu
**Balázs Wacha**, Hungario, Magyar Tudományos Akadémia, Nyelvtudományi Intézet
*Sekretario:* **Aida Čižikaite**, Litovio, estrarano de ILEI

[1] AdE – Akademio de Esperanto
[2] AIS – Akademio de la Sciencoj, San Marino

## Antaŭkonference

En la ĉi-jara konferenca temo de ILEI la centran lokon okupas la lingvolernado en kunteksto de lingvaj rajtoj kaj rajto je edukado. En la konferenco de esperantistaj pedagogoj atento nature estos turnita al la pedagogia rolo de E-o, kiu estas diversaspekte traktata ankaŭ en ĉi tiu numero de IPR. Tiel, Probal Daŝgupto per sia *Letero al pedagogoj* emfazas eblan rolon de E-o en la nuntempaj cirkonstancoj de lernanto-centra pedagogio kaj pedagogia diversigo. Aliaj kontribuantoj informas pri rezultoj kaj spertoj el la praktiko aŭ pri siaj teoriaj konsideroj.

Pasintnumere ni enkondukis la Sciencan Komitaton de IPR. Nun komenciĝas serio de koncizaj prezentoj de la SK-anoj, kaj jam aperas unuaj recenzitaj artikoloj.

En aparta bloko legeblas pliaj informoj pri la konferencaj aranĝoj kaj subteno kiun ili havas de la lokaj kaj universitataj aŭtoritatoj.

Dum la konferenco kunsidos la Komitato. La komitatanoj aparte ricevos la kutimajn raportojn kaj aliajn materialojn. Malkiel en la antaŭaj jaroj, la kutime tedaj raportoj ĉi-jare ne aperas en la revuo, sed cedas la spacon al pli freŝaj informoj. Dankon al ĉiuj aŭtoroj de la kontribuoj.

Agrablan legadon kaj ĝis la revido en Parmo!

*Radojica Petrović*

# Letero al pedagogoj

*de Probal Daŝgupto*

*Estimataj Esperantistoj-Pedagogoj,*

Saluton. La pedagogio rilatas ne nur al la entrepreno de plenkreska instruanto, kiu devas kunlabori kun infanoj por instigi la lernadon. Aparte ofte ĉe la esperantistoj, temas pri unu plenkreskulo elinstiganta la kunlaboron de aliaj plenkreskuloj, kies lernemon ofte bremsas nesufiĉe fleksebla psiko aŭ nesufiĉa tempodispono. Dume, la kibernetika hodiaŭo surseĝigas nin antaŭ la magia sed – se diri la veron – frustra ekrano, kiu remuldas la renkontiĝejojn de lernemaj kaj lernigemaj kunlaborontoj. Ĉi tiu disdiversigo de la pedagogia entrepreno certe iom draste efikas sur la eblojn kaj maleblojn de komuna pensado pri ĉies laboroj.

La efiko de tiu diversigo povas unuavide aspekti negativa. Oni povas supozi, ke homoj instruantaj al malsamaj lernantaroj devus nete dispensi pri siaj farotaĵoj. Sed la tiel konceptita diversigo de la alinfana pedagogio, la senpera plenkreskula pedagogio kaj la reta pedagogio estas senfantazia, burokratia miskompreno de la defio. Precize tiu diversigo de nia labora sfero, tamen, pozitive efikas sur la memkomprenon de la pedagogio. Kiel do?

Nu, en pli fruaj epokoj, ekzistis en kaj ekster nia sfero la ĝenerala impreso, ke la pedagogio estus senalternative alinfana kaj iel sendefie, senekscite praktika aplikejo de ideoj forĝataj sur aliaj, vere teoriaj kaj intelekte stimulaj terenoj. Laŭ tiu bildo, ni pedagogoj ŝajnis iaj glorigitaj infanprizorgantoj. La popolklerigo aspektis kvazaŭ fakultativa pligrandigo de ĉefe porinfana entrepreno. Hodiaŭ, la bildo ŝanĝiĝas. Pro la disdiversiĝo de la praktikaj aplikejoj de nia pedagogia komprenaro, ni kapablas pli klare vidi, kaj povas montri al aliaj, ke unu konstanta abstrakta pedagogio devas diskrei konkretajn kaj taŭgajn metodojn por lernantoj junaj kaj nejunaj, por lernantaroj ĉeestaj kaj forestaj.

Ĉi tiun kapablon ni devas taŭge kompreni en niaj propraj spertujoj. Multajn instruistojn vundas la sento, ke eminentaj universitatanoj kreus ie la abstraktan bazon de la pedagogio, kiun la malpli prestiĝaj kaj nealte salajrataj lernejistoj devus apliki antaŭ la junaj klientoj. Ne sufiĉas simple forĵeti tiun klasikan bildon de la hierarkio inter la universitataj teoriistoj kaj la teorio-aplikaj pedagogoj. Tro naiva inversigo de la bildo igas nin foje diri, ke estus egale kreaj la lernantoj mem, kies kreemon la instruistoj nur elinstigus. Kvankam la "konstatado" (fare de infanoj) estas principe utila klavo por la farota kunlaboro, ni tamen devas multe nuanci tiun koncepton, por ke ĝi iĝu praktike utila. La lecionejo estas areno de iuspeca kuna kreado. La lernantoj, ankaŭ se ili estas infanoj, devas grave kunroli en tiu laboro. Sed la bazo de tiu kunlaboro inkluzivas materialojn jam pretigitajn de aliaj; la nunaj kreantoj de lerno, la nunaj lernantoj kaj iliaj helpantoj nun devas ion plufari per tiuj jamaj materialoj. La instruistoj helpas la lernantojn aktive stiri sin sur tiu preta vojo. Tiel la stirado, kiel la stiriĝado, apartenas al la kuna kreemo.

Ĝis nun mi ne diris ion, kio aparte rilatus al la esperantista pedagogia projektaro. Tamen permesu, ke mi pluiru ĝuste sur tiu ĉi tre ĝenerala bazo, kiu povas ŝajni eĉ eksterteme aŭ troe ĝenerala.

Se ni bezonas nuancan karakterizon de la kuntasko de la instruisto kun la lernantoj, kaj se inter ili fluas trafiko de kreemo malsamiĝanta en diversaj momentoj de la instrua procezo, ni do tuj rimarku, ke la ĵusa skizo restas konstanta tra ĉiuj lernantaroj. Diversas nur la specoj kaj temporitmoj de la helpado. La plenkreskuloj kapablas pli memstare uzi la lernomaterialojn kaj pli longe atendi la helponton kaj konsilonton. La infanoj havas malpli longan atendotenon. La forestantaj lernantoj en reta sistemo eĉ pli memstarigas sin kaj uzas helpaĵan repertuaron, en kiu la deforaj konsilemaj instruantoj ludus nur iujn rolojn. Konstantas la fakto, ke la homo, volanta ion lerni, bezonas helpon. En la pedagogio, ni okupiĝas pri la teorio kaj praktiko de la trafiko de tiu helpo – kiel plej utile doni kaj ricevi ĝin.

Sed la homo tute ĝenerale estas inteligenta kaj do lernema besto. Sekvas de la ĵusa rezonado, ke la homo, sub la plej abstrakta lupeo, montriĝas helpo-bezona. Se ni metas en la centron tiun ĉi konstaton, ni trafas ion gravan.

La plej kutimaj individuismaj perspektivoj emfazas la memstarecon de la homo. Konsentite. La homo, en la prototipa plenkreskula stato, emas memstari. Sed kion la homoj memstare faras? Ili memstare funkciigas sian parton de la lerna procezo, dum iliaj instruaj kaj helpaj kolegoj apudstaras kulise por disponigi la ceteron. Sen tiuj kolegoj, la memstara homo staras vane. (Ĉu ni kunstaris vane? Bona titolo por ĉu-romano.)

Esperanto povas do esti rekte helpa. Ĝi estas helpa lingvo. Ĝi evoluigis unike helpemajn pedagogiojn. Ni rajtas fieri pri tiu historio. La esperantaĵaj

strukturoj, sur kiuj ni bazas nian laboron – ekde la afiksoj kaj la tabelvortoj ĝis nia kapablo klarigi la pli klerulajn malfacilaĵojn (analizo, individuo, fenomenisto) per pli popole simplaj malpakoj (dis-er-ig-o, unu-op-ul-o, aper-aĵ-ism-an-o) – estas trezoro de la universala pedagogia kulturo, pri kiu niaj kolegoj ekster Esperantujo ne disponas.

Ni nun vivas en epoko, kiam la helpindeco de la homoj iĝis reliefa. Ekde la cunamo de 2004 kaj la uragano en 2005, eĉ la amaskomunikiloj agnoskas tion. Se ni forĝos en la pedagogejoj de nia kulturo novajn ilojn, pli ĝenerale uzeblajn, per kiuj oni tute sisteme kapablos ponti inter la malpli facilaj, malpli alireblaj konceptoj kaj la pli simplaj, pli tujaj ne nur en la logiko sed ankaŭ en la praktika pedagogio, tiam ni estos kultivantaj, en la formo Esperanto, ĝardenon de absolute ĉiesa utileco. Tiu ĝardeno eterne restos legitima esplorobjekto, studobjekto, utilaĵo por la pedagogia entrepreno je ĉiuj niveloj. Tiamaniere ni atingos definitivan rezulton, kiun ne forŝovos eventuala inundo de la angla en ĉiuj lingvejoj. Nomu la entreprenon "facilistiko", se helpos vin slogano. Agu laŭ viaj prave diversaj plaĉoj. Sed, estimataj pedagogoj, bonvolu fari ion. Ni ne havas multe da tempo. Bonan nokton!

Amike: *Probal*



*Probal Daŝgupto kaj lia filo en Hajderabado*



**Renato Corsetti**

## Ĉu gravas pleje la baza lernejo aŭ la universitato? Ĉu gravas pleje la unua kurso aŭ la lasta?

De tro multe da jaroj mi estas leganto de ĉi tiu revuo. Se mi ankoraŭ ne laciĝis, tio diras ion pri mi aŭ pri la revuo aŭ pri ambaŭ. Unu el la artikoloj legitaj en ĉi tiu revuo restas inter miaj preferataj artikoloj. Temas pri artikolo de *Joseph Dörr* aperinta en la numero 1-2 de 1994 en la paĝoj de 21 al 25 kun la titolo „Baza vortprovizo de E-o cele al instruado".

*Joseph Dörr* esence diras: se vi instruas E-on estas kelkaj aferoj, kiujn vi nepre devas instrui. Pri la cetero ni povas diskuti. Ĉi tiu minimuma instrupakaĵo inkluzivas ĉiujn finaĵojn, sufiksojn, prefiksojn, kaj liberajn morfemojn. Mi nomas tiel tiujn vortojn, kiuj povas funkcii en E-o sen bezono de aparta finaĵo, ekzemple: ili, dek, plej, tre, ktp. Ankaŭ ĉi-kaze oni povas diskuti, ĉu morgaŭ apartenas aŭ ne al ĉi tiu minimuma instrupakaĵo. Aplikante la aferon praktike en unu el miaj lernolibroj, mi alvenis al 210 morfemoj *[vidu la tabelon sur p. 9-a! – NdlR]*

Se iu estas scivolema, kaj mi ege kuraĝigas esti scivolema en ĉi tiu kampo, mi aldonas ilin fine de la artikolo, nur por doni konkretan ekzemplon pri tio, pri kio ni parolas.

Post tio ekzistas jam kelkaj frekvenc-listoj en Esperanto. Famegaj estas tiu de *Zlatko Tiŝljar* kaj tiu de *Kontakto*, kiu estas uzata ankaŭ en *Juna amiko*. Se vi prenas tiujn aŭ aliajn listojn, kaj vi elektas la eblan enhavon de unuagrada kurso, vi venas al proksimume 600-700 morfemoj aŭ lingvaj elementoj, kiuj estas la plej gravaj por parolanto de E-o. Kompreneble, se vi loĝas en Italujo, vi forigus kelkajn vortojn kaj aldonus la vortojn Romo, koloseo, pico kaj spagetoj. Se vi loĝas en Burundio vi nepre forigu la vorton Romo kaj nepre aldonu la vorton Buĵumburo, ktp.

Surbaze de tiuj principoj mi nun konsilas al afrikanoj interesiĝantaj pri instruado de E-o, ke esence la verkanto de la kurso-teksto kaj/aŭ la instruisto bonvolu klarigi la signifon kaj la kombin-regulojn de proksimume 700 radikoj (kiuj inkluzivas ĉiujn sufiksojn kaj prefiksojn kaj ĉiujn tabelvortojn, alivorte la elementojn indikitajn de J. Dörr). Mi ne aldonas ankaŭ tiujn, sed interesiĝantoj povas trovi ilin en *www.afriko.org*, ĵonglante iomete en la sekcio 'Instruado'.

Mi ankaŭ konsilas aldoni dekon aŭ dudekon da vortoj pri lokaj specifaĵoj (Buĵumbur- sed ankaŭ Sahar- kaj subsahar- kaj bantu- kaj Kong-, ktp.). Kompreneble oni forigu same multe da ne tiom utilaj radikoj.

Poste ni venas al la kulturo de E-o. Mi konsilas, ke oni konigu al la lernantoj la *Manifeston de Prago* en nacia lingvo kaj en E-o kaj la informfolion "Ĝisdate pri Esperanto". Ambaŭ informiloj normale estas haveblaj ĉe la Centra Oficejo de UEA kaj en pluraj aliaj lokoj, inkluzive de la citita *www.afriko.org*. Oni povus longe diskuti, kio estas nacia lingvo en afrikaj kondiĉoj. Praktike mi diras al la afrikaj instruistoj, ke ili uzu ankaŭ la lokajn lingvojn, se la lernantoj komprenas ilin pli bone ol la oficialajn (kiel ofte okazas).

Fine oni konigu al la lernantoj informojn pri E-o kaj internaciaj E-organizaĵoj, kaj organizaĵoj ekzistantaj en la lando en kiu okazas la instruado.

Oni parolu mallonge pri la historio de la klopodoj trovi internacian lingvon de post la Meza Epoko ĝis la aperigo de la unua lernolibro de Esperanto, kaj oni donu informojn pri Zamenhof.

Oni transiru poste al la Unua Universala Kongreso de Esperanto, al E-o inter la du mondmilitoj, al la disvastiĝo de E-o ekster Eŭropo, al la historio de E-o en la lando en kiu okazas la instruado.

Pri organizaĵoj oni klarigu tion, kio estas UEA, TEJO, ILEI, la Afrika Komisiono, la loka landa asocio, kaj kion signifas la misteraj mallongigoj UK, D, FD, VD, JD?

Tio sufiĉas, laŭ mi, por la unua kurso.

Sed kial mi tiom interesiĝas pri la unuaj kursoj en Afriko? Parte pro hazardo, tio estas pro la neceso komenci starigi instruajn strukturojn en la afrika Esperantujo. Temu pri strukturoj, kiuj laŭgrade evoluos al landaj sekcioj de ILEI, sed kiuj jam nun komencu aranĝi siajn unuagradajn ekzamenojn kaj doni siajn unuagradajn diplomojn (se la papero estas kolora kaj la stampo granda, afrikanoj reagas precize kiel eŭropanoj al diplomoj).

Oni povas kritiki, ke la afero ne rilatas al tre granda nivelo de kono, sed ni komencu de la komenco. Mi mem kredas, ke la unua kurso estas multe pli grava ol la postaj kaj senfine pli ol la lasta, kiun oni faras, kiam oni jam scias ĉion kaj instruis E-on dum jardekoj.

Mi mem estas vivanta ekzemplo de tio, ke oni neniam vere scias ion, kion oni ne lernis en la baza lernejo. Pro malsano mi ne lernis dividi la italajn vortojn en unuopajn silabojn (tre grava scio, kiam oni skribis mane) en la dua jaro de la baza lernejo.



## Listo de la minimuma instrupakaĵo

| | | | | | |
|---|---|---|---|---|---|
| bo | n | tie | mil | ke | op |
| dis | j | tiel | milion | kvankam | on |
| ek | i | ties | miliard | kvazaŭ | eks |
| ge | as | tio | mi | nek | mis |
| mal | is | tiom | vi | ol | ism |
| re | os | tiu | ci | se | end |
| aĉ | us | ia | li | sed | obl |
| ad | u | ial | ŝi | tamen | ankaŭ |
| aĵ | ant | iam | ĝi | anstataŭ | mem |
| an | int | ie | ni | antaŭ | nur |
| ar | ont | iel | ili | apud | je |
| ĉj | at | ies | oni | ĉe | plu |
| nj | it | io | si | ĉirkaŭ | nul |
| ebl | ot | iom | ajn | da | nun |
| ec | ĉia | iu | la | de | nu |
| eg | ĉial | nenia | al | ekster | minus |
| ej | ĉiam | nenial | fi | el | plus |
| em | ĉie | neniam | for | en | aĥ |
| er | ĉiel | nenie | ne | ĝis | ha |
| id | ĉies | neniel | pra | inter | ho |
| estr | ĉio | nenies | sen | kontraŭ | ve |
| et | ĉiom | nenio | sur | krom | almenaŭ |
| ig | ĉiu | neniom | tra | kun | ambaŭ |
| iĝ | kia | neniu | aŭ | laŭ | ankoraŭ |
| il | kial | unu | ĉar | malgraŭ | apenaŭ |
| in | kiam | du | ĉu | per | baldaŭ |
| ind | kie | tri | do | po | ĉi |
| ing | kiel | kvar | dum | por | preskaŭ |
| ist | kies | kvin | eĉ | post | jam |
| uj | kio | ses | ja | preter | ĵus |
| ul | kiom | sep | jes | pri | pli |
| um | kiu | ok | jen | pro | plej |
| o | tia | naŭ | ju | sub | tre |
| a | tial | dek | des | super | tro |
| e | tiam | cent | kaj | trans | tuj |

Poste mi restudis la aferon dekojn da fojoj, sed ankoraŭ nun mi hezitas pri tio. Mi ne aŭtomatigis tiun scion, kion oni povas fari ĉefe en tiu aĝo. Same okazas pri Esperanto. Ĉiu volas paroli tian Esperanton, kian li lernis en la unua kurso.

Oni povas kritiki, ke la sistemo estas iom tro meĥanika: tiom da vortoj kaj ne pli, nek malpli. Nu, tiu kvanto baziĝas sur la kvanto lernebla en unu tradicia ĉeesta kurso, kiu daŭras plurajn monatojn. Sed se vi provas vidi la kvanton de vortoj en aliaj kursolibroj, vi vidos, ke ĝi ne multe diferencas laŭ kvanto, sed foje bedaŭrinde laŭ kvalito. Oni ne instruu pri metamorfozo aŭ grafiko antaŭ ol oni istruis pri –ar-, -ind- kaj apenaŭ.

## Propedeŭtika valoro de E-o por studo de la franca

*de Svetlana Mirošniĉenko, Sankt-Peterburgo, Rusio*[1]

***Temas** pri antaŭa eksperimento en kelkaj mezlernejoj de Sankt-Peterburgo en Rusio. La Esperanto-programo estis ellaborita en gimnazio № 271 kun profundiga studo de la franca, kie ĝis la jaro 2002-a oni instruis Esperanton devige. Tie Esperanto estis instruita ekde la **1991-a jaro**. La rezulto estis tre bona kaj la estraro permesis enkonduki Esperanton kiel devigan lernobjekton en la unua klaso (la 1-a grado de bazlernejo en Rusio) en la jaro 1993-a, kiam okazis E-eksperimento tra la tuta eks-Sovet-Unio sub aŭspicioj de AIS de San-Marino kaj kibernetika instituto de Paderborn (Germanio). Sufiĉe entuziasmigaj rezultoj estis atingitaj eĉ tiam, kiam jam ne temis pri eksperimento (ĝi daŭris mallonge). La lingvo tre nature eniris la lernejan programon. Ĝi helpis al la gelernantoj pli facile kaj kun plezuro lerni poste la francan. La multjara laboro permesis ellabori (aprobitan en la klaso) laboraĵon kiu ricevis la titolon «Aŭtora programo pri Esperanto. Por 1-10 klasoj. Baza kurso-unugrada ŝtupo, 2 horoj semajne. Nedeviga kurso-2-10 klasoj, 1 horo semajne». Post serioza esplorado, multnombraj «malfermitaj» lecionoj kaj eĉ urba pedagogia konferenco de instruistaro pri fremdaj lingvoj surbaze de la gimnazio la programo (340 horoj) estis atestita ĉe Sankt-Peterburga ŝtata universitato pri pedagogia majstrumado en februaro de la jaro 2001-a. La baza kurso (deviga) enhavas 68 horojn kaj ĉiu sekvonta fakultativa jaro enhavas po 34 horojn. La programo estas farita por montri al gelernantoj la similaĵojn kaj diversaĵojn de ambaŭ lingvoj. Dume la gelernantoj havas eblecon konatiĝi kun E-literaturo, E-faktoj ktp.*

[1] La artikolon recenzis la Scienca Komitato de IPR.



Instruistoj pri fremdaj lingvoj serĉas la plej efikajn instrumetodojn por akiri la plej bonajn rezultojn en sia pedagogia agado. Unu el tiaj metodoj ni vidas en propedeŭtika studo de Esperanto kiu estas lingvo-modelo por tiu ĉi celo (Formaggio 1995: p.9). Pro tio estis ellaborita la E-programo:

**Kialoj:**

1. Esperanto estas sufiĉe simpla por studi ĝin, ĉar ĝi estas logika.
2. E-o estas la lingvo, kiu helpas superi la psikologian barieron, kiu aperas kiam oni ekstudas fremdan lingvon.
3. Posedo de E-o plivastigas la filologian horizonton de la lernanto. (Formaggio 1995: p.73-74)
4. Danke al la studo de E-o disvolviĝas multaj kapabloj, kiujn oni bezonas ne nur en la lingva fako: ekz. kapabloj por klasifiki, observi, kompari, analizi, kombini.
5. La lernantoj atingas sufiĉe rapide realan kapablon paroli, studante E-on ne pli ol 400 horojn (laŭ nia sperto). «Por atingi kontentigan nivelon oni devas investi grandan kvanton da tempo. Proksimume 2000 studhorojn, diras Claude Piron.» (Formaggio 1995: p.5). Ĝenerale por paroli flue en alia fremda lingvo (la franca, la angla ktp.) oni bezonas ne malpli ol 10 mil horojn (Piron 2001: p.15-18 «Informilo»№114) praktikante ĝin konstante.
6. E-o ludas pozitivan rolon en la intelekta evoluo de la infano kaj influas pozitive la lernadon de multaj aliaj studobjektoj, ĉar ankaŭ integra proceso kun aliaj studobjektoj estas propraĵo de Esperanto, vd. geografion, historion, muzikon, literaturon, historion de kulturoj aŭ urboj (ekzemple tiun de Sankt-Peterburgo). Tia vasta integro influas multe la konstruon de la programo enhavanta kelkajn etapojn, kiu jam estis aprobita dum sufiĉe longa tempoperiodo en mezlernejo kaj donis bonajn rezultojn.

*La unua etapo* – propedeŭtika studado de E-o – estas destinita por gelernantoj de la unua klaso (en Rusio la plej malgrandaj infanoj, kiuj ekstudas en lernejo). Ĝeneralaj postuloj post la etapo: informoj pri Esperanto, scioj en la sfero de legado, skribado (Rakuŝa 1991: p.32), preparado al la percepto de la franca lingvo.

La aliaj etapoj estas fakultativaj, sed necesaj por posedi pli bone la lingvon.

*La dua etapo* estas destinita por gelernantoj de la sekvontaj klasoj (dum 5 jaroj) kiuj volus profundigi siajn sciojn en E-gramatikaĵoj, riĉigi sian vortprovizon por paroli pli flue (Rakuŝa 1991: p.122), por konatiĝi kun la etapoj de la E-movado kaj E-literaturo (originala kaj traduka).

*La tria etapo* estas destinita por gelernantoj de la klasoj 8-9 (2 jaroj). Dume estas formitaj jam stabilaj parolkutimoj. La kurso enhavas temojn, kiuj estas proksimaj al la temoj de la programo pri la franca. Do, oni uzas la leksikon, kiu similas la francan. Estas deviga analiza legado (Gvidlibro por supera ekzameno 1979: p.308), kio nepre helpas al pli bona studo de la franca.

*La kvara etapo* estas destinita por gelernantoj de la klaso 10. Ili jam praktike bone posedas esperanton. Ebleco de elparolo je ĉiuj temoj, ebleco de lego de E-periodaĵoj, ebleco de partopreno junularajn kunvenojn, kongresojn estas atingebla por la gelernantoj. En la lernejo kie profunde estas studata la franca lingvo, la lernejanoj pliriĉigas sian leksikaron. Ili evoluigas sian analizkapablon kaj detale studas gramatikaĵojn, kiuj similas la francajn formojn. Tio ne nur helpas, sed plejparte antaŭdifinas sukcesan studon de la franca.

Unu el kaŭzoj gravaj por studi fremdan lingvon estas strebo al komunikado. Pro tio la E-lecionoj estas faritaj tiamaniere, ke la lernantoj povu multe paroli kaj fari dialogojn. Por atingi bonajn rezultojn estas uzata Cseh-metodo. La instruisto paroligas instruatojn kaj la metodo aldonas amuzan karakteron al la lecionoj (Gvidlibro por supera ekzameno 1979: p. 288) La studprogramo estas farita tiel, por ke oni ripetu la studatan kaj studitan materialon konstante en dialogoj. Dum la lecionoj la studantoj ĥore respondas al demandoj en E-o. La lernantoj ne timas paroli. Do, ili studas la lingvon per rekta metodo en la komenco, poste en pli grandaj klasoj estas rekomendita uzi la gepatran lingvon. Ripetado de la studmaterialo plibonigas la memorkapablon. Por pli firme studi la materialon oni emfazas la formadon de perceptado kaj de reproduktado de tiu ĉi materialo. Tio estas la plej grava tasko, precipe dum la unua baza studetapo.

Estas studata ne nur leksika minimumo, sed ankaŭ la gramatika. En E-o la vortfarado ludas gravegan rolon (Rakuŝa 1991: p.32). La lernantoj, rigardante vorton per analizo, faras mem regulojn, kio permesas konservi la leksikon en la kapo sen granda problemo. Konatiĝo kun novaj modelaj frazoj realiĝas surbaze de materialo objekta kaj bilda. Por paroligi lernejanojn oni faras ankaŭ dialogojn kaj poste monologojn. La instruistoj atentigas la prononcadon (Rakuŝa 1991: p.127). La paroligo estas rimedo por aktive posedi la lingvon. La studvortaro estas farita konsidere la programon de la franca kiu poste estos studata.


La skribado servas por pli bone memorigi la leksikon uzatan en dialogoj, monologoj kaj legatekstoj (Gvidlibro por supera ekzameno 1979: p. 310) La rusaj lernantoj konatiĝas kun la latina aboco por prepariĝi al la franca skribmaniero. Konsideri la laŭgradan plimultigon de malfacilaĵoj, la utileco de la konscia komponanto dum la studado, formado de prononcaj, leksikaj, gramatikaj scipovoj kaj scioj en la sferoj de la legmaniero, parolmaniero, aŭskultmaniero kaj skribmaniero kreas eblojn por pli sukcese studi la fremdan lingvon (Formaggio 1995: p.74).


**Fontoj:**

- Elisabeta Formaggio «Lingva orientado per esperanto», Esperanto Radikala Asocio, Romo, 1995
- Rakuŝa R. «Metodiko de la esperanto-instruado», UEA, Rotterdam, 1991
- «Gvidlibro por supera ekzameno» Hungara E-Asocio, Budapest, 1979
- «La Informilo» Espéranto France-Est, Association Culturelle por la promotion de la langue internationale Espéranto, № 114, 2001 (p. 15-18)


## Lernmotivoj kaŭzas kompetentecon

*de Zlatko Tiŝljar*



La sukceso en lingvolernado dependas – kiel en ĉiu lernado – ĉefe de la motivoj. La motivojn oni povas dividi je du specoj: motivoj kiuj eliras el reala bezono kaj motivoj kaŭzitaj de premo (devigo de la ĉirkaŭa socio). La unuajn mi nomos: la veraj motivoj kaj ilin oni povas denove dividi je du specoj: motivoj kaŭzitaj de tuja kontentigo de iu bezono (ekz. infano en fremda ĉirkaŭo, kiu nepre volas ludi kun infanoj, kiujn ĝi ne konas, junulo kiu volas tuj paroli kun bela simpatia alilandanino parolanta nur de li nekompreneblan lingvon...) aŭ motivoj kaŭzitaj de klara konscia bezono pri komunikado

(mi volas lerni la lingvon de miaj usonaj parencoj, kiujn mi retrovis, mi volas lerni la lingvon de homoj, kiuj simile pensas kiel mi...).

La motivojn ligitajn al socia premo mi nomus motivoj de intereso (mi volas lerni por havi diplomon - ne por komuniki -, mi volas lerni por havi pli altan salajron - ne por komuniki...). Tiuj estas malfortaj motivoj kaj ne kondukas al reala scio de la lingvo, al scio kun kompetenteco, kun apliko-kapablo. Verajn komunikkapablajn sciojn de E-o akiras nur tiuj, kiuj lernas por kontentigi siajn bezonojn (gejunuloj kiuj venas al Internacia Junulara Kongreso kun nur malmulta scio, homo kiu renkontis belan alilandan esperantistinon, homo kiu jam havas la propran filozofion kaj li volas fari ion por lingve faciligi la komunikadon en la mondo aŭ iel tutmondigi humanismon kaj li eksciis, ke esperantistoj simile tendencas...)

Motivkatalizilo (motivigilo) plifortiganta la motivon (ĉu veran, ĉu motivon de intereso) estas la sukceso mem de la lernado. Eĉ se iu komencas lerni E-on pro kontentigo de iu intereso, sed havas rapidajn sukcesojn kaj havas ŝancon renkonti homojn el eksterlando, kiuj parolas tiun lingvon, tiu ekhavos veran bezonon, lia motivo de intereso transformiĝos al vera motivo. Tial instruistoj kaj instruantoj de E-o devus nepre aranĝi kursojn tiel, ke la fina parto de la kurso estas partopreno en iu internacia E-aranĝo, en kiu estos malmultaj samlandanoj kaj en la komencaj instrufazoj oni devus uzi lernmetodojn, kiuj ebligas tujajn praktikajn kapablojn per minimuma scio – do metodoj bazitaj je frekvencofteco (ekz. la Zagreba metodo), tiel ke lernanto tuj post la dua leciono kapablu mem krei frazojn uzeblajn en la vivo. Sen tio neniu pedagogia metodo atingos rezultojn, kiuj kondukas al uzkapablo.

Miloj da hungaraj diplomitoj kadre de la leĝo, kiu ebligas al ili agnoskon de kono de fremda lingvo, signifas apenaŭ kelkdekon da veraj uzantoj de la lingvo, por kiuj la lingvo el la sfero de materia intereso fariĝis bezono por komuniki.

Sen iu el la veraj lernmotivoj lernantoj povas atingi nur certagradan memoratan, sed ne aplikeblan scion. Nur la veraj lernmotivoj menciitaj supre instigas la homon apliki plian necesan energion, kiu la memoratan konon transformas al aplikebla scio, do al kompetenteco.

Danke al dio la samo validas ankaŭ por lernado de kiu ajn lingvo.

Tial la lerneja instruado de fremdlingvoj ĉie tra la mondo havas apenaŭ menciindan sukceson. La infanoj ne lernas pro vera bezono komuniki sed pro tio, ke oni devigas ilin. Tio neniel povas konduki al sukceso.



## Biografietoj de la membroj de Scienca Komitato


### *Věra Barandovská-Frank*



Barandovská-Frank (nask. 1952), ĉeĥino, doktorino pri klasika filologio, kun intereso pri latinidaj planlingvoj kaj viva latina lingvo.
Instruis modernajn lingvojn en faka altlernejo en Ostrava, Ĉeĥio, ekde 1992 ofertas interlingvistikajn seminariojn en la Universitato de Paderborn, Germanio.
Plenrajta docento de AIS San Marino.

### *Detlev Blanke*

Blanke, Detlev (nask. 30.5.1941), 1959-1964 studis germanan filologion, geografion kaj pedagogion en la universitato de Rostock, 1964 -1968 faka instruisto; de 1968-1990 respondeca sekretario de E-Asocio en Kulturligo de GDR (Berlin).



Li doktoriĝis (1976) kaj habilitiĝis (1985) pri interlingvistikaj temoj ĉe Humboldt-Universitato en (orienta) Berlin, tie estas docento pri interlingvistiko (1988-); prezidanto de "Gesellschaft für Interlinguistik e.V."(GIL) (1991-).

Ĉefaj verkoj „Plansprache und Nationalsprache - Einige Probleme der Wortbildung (1981), „Internationale Plansprachen“(1985); „Interlinguistische Beiträge – Zum Wesen und zur Funktion internationaler Plansprachen“(2006); redaktoro de „der esperantist“ (1970-1990), „Interlinguistische Informationen“ (1992-), „Informilo por Interlingvistoj (1992-).

Membro de la redaktaj komitatoj de „Language Problems & Language Planning“ kaj „Esperantologio – Esperanto Studies“.
Elekta bibliografio ĝis 2000 en "Studoj pri Interlingvistiko"(Red. Sabine Fiedler/ LIU Haitao, Dobřichovice: Kava-Pech (2001)
(vidu: *www.esperantic.org/librejo/ dbstudoj/* ).

## Renato Corsetti



Naskiĝis la 29-an de marto 1941-a. Loĝas en Italujo. Studis ekonomion kaj poste lingvistikon.

En la unua parto de la vivo laboris kiel bank-direktoro rilate al organizado, en la dua parto kiel universitata esploranto kaj instruanto pri psiĥolingvistiko.

Verkis ĉefe pri lingva politiko kaj psiĥolingvistiko. Esplor-temoj de la lastaj jaroj: infana dulingveco kaj instruado de fremdaj lingvoj al malgrandaj infanoj.

## Michel Duc Goninaz




Naskiĝis en 1933, eklernis E-on en 1946, studis en Pariza École Normale Supérieure (Supera Pedagogia Instituto), en Sorbono kaj en la Moskva Ŝtata Universitato.
Post akiro de licencio pri beletro kaj de agregacio pri la rusa lingvo, instruis la rusan lingvon en liceoj (1959-67) kaj en la Universitato de Provenco (Aikso-Marsejlo), kiel docento, de 1967 ĝis la emeritiĝo en 1996.

Ekde de 1970 instruis krome E-on en la sama universitato.
Gvidis la revizion de la Plena Ilustrita Vortaro, aperinta kiel la Nova Plena Ilustrita Vortaro (2002, 2005).




## Probal Daŝgupto



Naskiĝis en Kolkato (en Barato) en 1953. Li esperantistiĝis en 1967.
Doktoriĝis en Nov-Jorka universitato, 1980, pri la genera sintakso de la bengala. Lektoro en Kolkato (1980), docento en Puneo (1980-89), profesoro en Hajderabado (1989-nun).
Membro de la Akademio de Esperanto (1983-nun); unu el ĝiaj vicprezidantoj (2001-nun).
Kunredaktoro de „Lingvaj Problemoj kaj Lingvo-Planado” (1990-nun). Libroj en Esperanto (tradukoj el la bengala): „Primico” (TK/Stafeto, 1977); „Mi juna” (Esperantaj Kajeroj, 1989); „Klera edzino” (Edistudio, 1995).

## Gudavičius Aloyzas



Litovo naskiĝinta en 1940. Finis Filologian fakultaton (fakon rusa lingvo kaj literaturo) de la Šiauliai pedagogia instituto.
Doktoriĝis en 1970, habilitiĝis en 1990. Nuntempe li estas profesoro pri lingvistiko en Humanisma fakultato de la Šiauliai-universitato kaj prezidanto de la universitata senato.
En la jaroj 1991 – 1997 li estis elektita rektoro de la Šiauliai-universitato.
Liaj ĉefaj sciencaj interesoj estas ĝenerala lingvistiko, semantiko, kompara semantiko, etnolingvistiko kaj interlingvistiko (esperantologio).
Publikigis ĉirkaŭ cent artikolojn pri lingvistikaj kaj lingvodidaktikaj demandoj en litovaj kaj eksterlandaj eldonaĵoj, i. a. la librojn “Kompara semasiologio de la litova kaj la rusa lingvoj” (ruse, 1985), “Etno-lingvistiko” (litove, 2000), “Enkonduko en interlingvistiko” (litove, 2002) kaj lernolibrojn por studentoj kaj lernantoj.
Nun li havas devigajn kursojn de ĝenerala lingvistiko, etnolingvistiko, semantiko, la rolo de lingvo en interkultura komunikado kaj libere elektatan kurson de interlingvistiko.

*(NdlR - daŭrigota)*

# Koncepto de instruprogramo („curriculum") celanta edukon al kulturo de paco

*Mireille Grosjean, instruistino, Svislando*
*<mireille.grosjean@rpn.ch>*[2]

**Komenca noto**
La koncepto „curriculum" trovas sian lokon en la jardeko por kulturo de paco kaj senperforto kaj ligiĝas al Manifesto 2000 de UNO kaj UNESKO por kulturo de paco kaj senperforto. Ĝi estas tute aŭ parte uzebla en iu ajn lerneja situacio ie ajn en la mondo.

**Historia noto**
En 2001 argentinaj esperantistoj petis Mireille Grosjean koncepti kompletan instruprogramon celantan edukadon pacen; ili deziris prezenti ĝin dum nacia kongreso pri tiu ĉi temo. La gravaj ekonomiaj problemoj, kiuj ekis poste, malebligis la agadon.

La „curriculum" konsistas el 20 punktoj.

La „curriculum" **entenas kvar aksojn.**

Unue ĝi entenas lernotaĵojn pri konfliktosolvado, kie konflikto estas la ĉefa temo, same kiel ĉapitro de matematiko aŭ de fiziko. La lernado de senperforta komunikado apartenas al la sama akso. Oni povas paroli pri **akiro de teknikoj**.

Alia akso estas la **„reviziado" de la instruado** pri kutimaj lernobjektoj. Oni revizias ilin **„de interne"**, oni enkondukas novan sintenon en tiuj instruadoj.

Ni vidu kiel ekzemplon la *instruadon de historio*:
„Granda atento devas esti donata al tiu fako, al la enhavo de la dokumentoj kaj al eldiradoj de la instruisto. La enhavo jenu:

1. La ĉiutaga vivo de la homoj en ĉiu epoko.

[2] Vi povas trovi tiun ĉi artikolon ankaŭ en la hejmpaĝo de IPR: *http://ilei.info/ipr/edukado_al_paco.htm*



2. Homaj asocioj kaj registaroformoj kun ekzemploj kaj analizo de pozitivaj kaj negativaj aspektoj, ĉefe en rilato kun bezonoj kaj sentoj de la popolo.
3. Studado de la vivo kaj agado de personoj, kiuj lumigis sian epokon kiel lumturo: oni studu pli pri Bartolomeo de Las Casas ol Kristoforo Kolombo, pli pri Gandhi ol Hitler, pli pri Dalai-Lama ol Ĉang Kaj Ĉek, pli pri Martin Luther King ol Lindon Johnson, kiu komencis la militon en Vietnamo, pli pri Mandela ol Mobutu".

*(„Curriculum", punkto 4)*

La „curriculum" montras ankaŭ kiel „tutmondigi" la sciojn montrante la originon de la instruataj materialoj. En matematiko la ĉefaj ĉapitroj venas el Barato/Hindio aŭ el arabaj landoj. Tiu aspekto devas trovi lokon en la instruado *(„Curriculum", punkto 9)*

**La respekto** estas en la centro de pacedukado. Ĝi komenciĝas pere de la respekto de la infano mem. Konkrete tio tradukiĝas per rekomendo, ke ĉiu infano devas lerni la legadon kaj skribadon en sia denaska lingvo. Laŭ la regionoj en la mondo tiu postulo povas alporti gigantajn problemojn... ekzemple en Svislando aŭ en Alzaco, kie la infanoj uzas dialekton hejme. Tiu respekto devas esti en la centro de la klasovivo tagon post tago. Plie tio konkretiĝas pere de la punkto 5:

*„Respekto de la ĉirkaŭa medio.*

La respekto, kiun oni klopodas enmeti inter la homojn, certe same koncernas la manieron agi kun la ĉirkaŭa medio. La kutimo apartigi la rubaĵojn celante reutiligadon de la plimulto de ili kaj la respekto de la naturo ĉirkaŭa apartenas al enklasa laboro. Poste la infanoj kunprenos tiun farmanieron hejmen. La nocio de harmonio koncernas ne nur la homaron sed la tutan biosferon."

Alia konsekvenco de tiu nocio pri respekto konsistas el postulo, ke la geinstruistoj estu pagataj, kaj sufiĉe pagataj, kaj ke la klasoj havu kontentigan grandecon. *(„Curriculum" punktoj 17 kaj 18)*

**La interŝanĝoj** ebligas al la infano situigi sin en la granda homa familio. Ili forprenas al li/ŝi la timon antaŭ la nekonateco. Per ili la infano ekscias pri la malsamecoj kaj eklernas digesti ilin estante bone enkadrigita fare de edukistoj. Ĉiuj formoj de interŝanĝoj estas bonvenaj. Certe oni rekomendas ilin celante pli bonan lingvolernadon, ĉar vektoro por

komunikado estas bezonata. La ideala vektoro neŭtrala kaj demokrata estas certe E-o. La „curriculum" tial antaŭvidas la lernadon de la internacia lingvo sufiĉe frue por komenci la kontaktojn en la aĝo de ok jaroj. Ekzistas pruvo scienca, ke la lernado de Esperanto estas la plej bona eksalto al la studado de aliaj fremdaj lingvoj. La dotitaj infanoj do povos unue lerni legi kaj skribi en sia denaska lingvo, poste ili lernos la oficialan lingvon de sia lando, poste E-on kaj poste aliajn gravajn aŭ lokajn lingvojn laŭplaĉe. La uzo de E-o ebligos al ili havi kontaktojn tra la mondo; tio alportos al ili sciojn en la fako geografio. Plie la infano eksentos sin membro de la granda homa familio. Tiu punkto estas tute centra en pacedukado, ĉar antaŭ ol esti sendata al milito, soldato travivas cerbolavadon, dum kiu la propra registaro klopodas meti en lian/ŝian kapon la ideon, ke tiu aŭ tiu popolo estas la malamiko. Ĉar esperantisto havas geamikojn ĉie en la mondo, li aŭ ŝi ne akceptos tiun propagandon. Vidiĝas multaj ekzemploj de tiu fakto tra la dudeka jarcento.

Klasointerŝanĝoj ebligas renkontiĝojn, kiam la distanco ne estas tro granda. Ĉiu eŭropa lando havas centran oficejon pri klasointerŝanĝoj, kie oni povas trovi partnerklasojn. Ekster Eŭropo oni povas serĉi tra edukministrejoj aŭ ambasadejoj. Ekzemple la klasointerŝanĝoj inter gelernantoj de Francio kaj Germanio ebligas la forviŝon de la malnovaj skemoj malamikaj. Alia ebleco estas fari komunan restadon en alia regiono kun temo studenda aŭ kun laboroj praktikaj kaj utilaj kiel prizorgado de arbaro aŭ de marbordo.

**Fina noto**

Legante tiun „curriculum" oni povas pensi, ke la aŭtorino estas en plena revo... Certe tiu instruprogramo estas utopio. Certe ĝia konkretigo, ekzemple en evoluantaj landoj, kostus ege multe, eĉ pli ol iliaj financaj kapabloj. Tamen oni pro tio ne forĵetu ĝin! Fakte oni povas elpreni partojn el ĝi, oni povas iri iom laŭ ties vojo. Oni povas jam antaŭvidi, ke ĝi neniam komplete efektiviĝos. Tamen estas fakto, ke la paĝo „curriculum" estas la plej vizitata paĝo de la TTT-ejo de ASEPAIX, Asocio svisa de Edukistoj Pacen (*www.asepaix.ch*). Ĝi ekzistas jam en la franca kaj en la germana. Tradukoj en la hispana kaj itala venos. Oni povas konstati, ke tiu instruprogramo konsistas el aro da konkretaj proponoj kaj ne el abstraktaj politikaj eldiraĵoj.



Personoj sen retaliro povas akiri unu ekzempleron paperan de la „curriculum" ĉe la aŭtorino *Mireille Grosjean, pf 9. CH 2416 Les Brenets. Tél. (+41 32) 932 18 88, Svislando.*

**Prireta noto**

Indikoj pri Esperanto troviĝas – interalie – en la jenaj retejoj:

- www.esperanto.net
- www.esperanto.org
- www.esperanto-sat.info
- www.esperanto-france.org
- www.edukado.net
- www.lernu.net

La lastaj du ebligas lerni Esperanton en cento da horoj.

**Bibliografia noto (por franclingvanoj)**

Grosjean Mireille «Les Echanges de classe Clé en main» Office du Matériel scolaire, rue des Tunnels 1, CH 2000 Neuchâtel. Adresse électronique: sems chez ne.ch 1995. Classeur de 280 pages A4 qui contient 80 leçons clé en main pour Unités Linguistiquement Mixtes ULM ;-)
Janton Pierre «L'Espéranto» Que sais-je ? n° 1511, puf, Paris 1989, 3e édition
Piron Claude «Le Défi des Langues» éd. L'Harmattan, 1998, 2e édition.




**Biografia noto**

*Mireille Grosjean* instruas en lernejoj de la meza nivelo ekde 1970. Ŝi unue instruis en la germanparola parto de Svislando (Alemanio), poste en la francparola parto (Romandio); pro tio ŝi ekorganizis klasointerŝanĝojn. Pro ŝia intereso pri interkulturaj rilatoj E-o trovis ĉe ŝi fruktodonan terenon en 1985.

Ŝi reprezentas Svislandon en la Komitato de Universala E-Asocio kaj aktivas en la kampo de la prilingvaj ekzamenoj de UEA/ILEI. Ŝi ofte faras klasointerŝanĝojn kaj instruas konflikto-solvadon.

# Projekto Lingvolanĉilo

*David Kelso (Prezidanto de la projektogrupo)*



Multaj legantoj de IPR jam aŭdis pri tiu pedagogia iniciato el Britio, sed iuj ne. Ni ricevis tiom da demandoj de alilandaj instruistoj, ke ni decidis ke utilus fari artikoleton pri la projekto, por sciigi al ĉiuj kio ĝi estas - kaj ne estas!

La nasko de la ideo estis decido de la britia registaro, maldevigi en la duagradaj lernejoj (gimnazioj, ni diru) lernadon de fremda lingvo kaj, iom poste, doni al ĉiu lernanto aĝa inter 7 kaj 12 jarojn rajton instruiĝi pri fremda lingvo.

[La laborista partio en Britio iom reverkis la anglan lingvon en politika kunteksto: maldevigi estas pozitiva koncepto, do akceptebla, sed devigi por ili estas negativa, tial neakceptebla; oni uzu prefere rajtigi, kvankam la rajtoj de lernantoj kreas devojn al instruistoj kaj lernejoj!]

La maldevigo okazis jam antaŭ du jaroj, do Britio estas eble la sola evoluinta lando en la tuta mondo kie fremdaj lingvoj ne nepre aperas en la gimnazia studprogramo? La rajtigo enkondukiĝos tra pluraj jaroj ĝis 2010 kiam ĉiu unuagrada lernejo en Anglio (Skotlando kaj Kimrio havas iom apartajn aranĝojn) devos oferti almenaŭ unu fremdan lingvon. Pro la tradicia libero en la anglia lernejo-sistemo, oni ne precizigas kiu lingvo, dum kiom da horoj, aŭ da jaroj, nek laŭ kiu instrusistemo .......... vivu la malsamo!

La legantoj povas imagi, ke tiu politiko estas sufiĉe polemikiga en Anglio. La registaro esperas ke, se gejunuloj sukcesos pri lingvolernado en la unuagrada lernejo, ili pli entuziasmos pri tio en la duagrada; tamen neniu vidis konvinkan pruvon pri tia espero. Krome, mankas en la plimulto de la unuagradaj lernejoj instruistoj kapablaj instrui fremdajn lingvojn. En Britio instruistoj en unuagradaj lernejoj estas ĝeneralistoj, ne fakuloj. En sia diplomprogramo ili studis pedagogion de la tiamaj studobjektoj de la elementa lernejo: legado, skribado, kalkulado, muziko, arto kaj la natura/socia medio. Pri fremdaj lingvoj, nenion. Iuj hazarde scipovas iun fremdan lingvon, pro la familia etno, pro geedziĝo, pro alilanda naskiĝo aŭ



simile - sed tute hazarde. La ceteraj instruistoj ĉiuj iom studis iun fremdan lingvon en gimnazio - plej ofte la francan - sed antaŭ tiom da jaroj kaj ne ĉiam tre sukcese! Plue, mankas en la elementaj lernejoj necesaj rimedoj: libroj, son-/vidaj bendoj/diskoj, lernhelpiloj, grafikaĵoj k.s. Entute, ne tre kontentiga situacio.

Dum tiu periodo enposteniĝis kiel Kunordiganto pri Edukaj Aferoj en la landa asocio, E-Asocio de Britio (EAB), *Anĝela Tellier*, kiu mem estas diplomita instruisto pri fremdaj lingvoj kun multjara sperto de instruado je kaj unuagrada kaj duagrada niveloj. Unuavice ŝi multe okupiĝis pri ĝisdatigado de la kursoj kaj ekzamenoj de la landa asocio, sed post mallonga periodo ŝi pli larĝe elrigardis kaj rimarkis tiun unikan eblon en la landa eduksistemo. Okazis en la eduka fako de EAB (efektive, la britia sekcio de ILEI) diskutado pri la situacio kaj la ebloj; la rezulto estis propono krei novan E-instruprogramon ĝuste por la unuagradaj lernejoj. Tamen estis en la koncepto unu granda malsamo de jamaj programoj kaj kursoj.

Ni ĉiuj scias kiom malfacile estas persvadi ne-esperantistojn, precipe lingvo-instruistojn, lerni kaj lernigi E-on. Des pli en la naskejo de la angla lingvo! Tamen, jen freŝa situacio. La unuagradaj lernejoj frontas preskaŭ neeblan defion de la registaro: mankas instruontoj, rimedoj, sperteco, tempo ….. eĉ kuraĝo. Tiuj lernejoj, kiuj jam faris ion aŭ instruas la francan lingvon, ĉar ili eĉ pli ne konas aliajn lingvojn – sed oni devas demandi kiom validas hodiaŭ, ke ĉiuj geknaboj lernu tiun unu eŭropan lingvon; aŭ ili instruas tiu(j)n lingvo(j)n, kiu(j)n hazarde iu membro de la instruistaro scipovas! Kiam la gejunuloj alvenas al la duagrada lernejo, ili posedas/os tute malsamajn lingvosciojn, laŭ kiu lingvo, ĝis kioma grado, laŭ kiu metodo ktp. Preskaŭ ĉiu lernejo serĉas solvon, solvon praktikan kaj ekonomian. Do, ni ofertu programon, ne de Esperanto kiel Esperanto, sed enkondukon al lingvolernado pere de la plej simpla, plej regula, plej fonetika lingvo, kiu okaze estas la internacia lingvo, E-o. Post unu-du jaroj da E-lernado, la lernintoj povos progresi al aliaj, naciaj, tiel nomataj naturaj lingvoj - aŭ daŭrigi la lernadon de E-o. Jen la konata propedeŭtika valoro de Esperanto.

Tiujn ideojn *Anĝela* kunmetis en proponon, kiun ŝi faris al la Komitato de EAB. Malgraŭ la fakto ke mi mem, kiel komitatano respondeca pri edukaj aferoj, estis la fuŝadvokato de la propono, la komitato entuziasme akceptis ĝin kaj asignis tute realisman buĝeton al la projekto, por jarkvino. Oni decidis lanĉi la projekton dum la prestiĝa *Language Show* (Lingvo-

Ekspozicio) en Londono, en novembro 2005, t. e. nur kvar monatojn post la decido de la Komitato. Unuavice okazis seminario de la plej spertaj britaj esperantistaj instruistoj, enkadre de la ĉiujara Somera Festivalo ĉe la kolegio Wedgwood, kie troviĝas la sidejo de EAB; el tiu seminario eliĝis projekto-teamo kaj detala laborprogramo por la unua jaro de la projekto. Post tri monatoj da sendorma aktivo fare de la teamo (sed ĉefe *Anĝela* mem) aperis Porinstruista Pakaĵo kio enhavis lernolibrojn (jam ekzistantajn), gvidliniojn, kompaktajn diskojn, glumarkojn, grafikaĵojn, lernhelpilojn, vortareton, bildvortaron (Mil Unuaj Vortoj) kaj legolibron (Unuiĝintaj Nacioj - Venu kun mi! de *Nane Annan* - kiun oni devis represi pro la kvanto bezonata!) – ĉio en belaspekta plasta teko. Samtempe aperis Informpakaĵo por disdonado al interesatoj, enhavanta plenan informon pri la lernprogramo kaj pri E-o.

Tiu lasta pakaĵo enhavis broŝureton verkitan plejparte de *Renato Corsetti*, pri la „Propedeŭtika valoro de E-o", kio aparte gravis ĉar la edukinstancoj kaj lernejestroj ne senhezite kredos nian aserton, ke E-o estas plej efika ŝtuplingvo al plua lingvolernado. Necesas pruvi tion, kiel eble plej science. Surprizis min ke – ŝajne – ankoraŭ ne ekzistas tia broŝureto kaj ni devis, iom haste, ekverki ĝin. (Parantezajn dankojn al *Renato* kiu afable malatentis la ceteran movadon dum iomo da tempo por helpi nin). Kiam mi mem havos iomete da tempo, mi intencas verki pecon por IPR ĝuste pri tiu temo; jam de la publikigo de la broŝureto, pluraj samideanoj sciigis min pri kroma informo pri tiu temo.

[Vidiĝis dum la evoluigo de la programo, iom da debato pri ties nomo. Anglalingve ni uzas la nomon *Springboard to Languages* (Saltotabulo al lingvoj). Tamen, estas du specoj de saltotabulo: la altaj, rigidaj; kaj tiu kiu troviĝas ĉe akvonivelo por risorte ĵeti onin tra la aeron. Springboard estas ĝuste la dua tipo (trampolino); tial ni elektis la anglalingvan nomon, por esprimi la ideon de eklanĉo al lingvolernado. Iu proponis Lingvotrampolino kiel tradukon sed la tradiciuloj kondamnis tiun neologismon! Fine teamano *Paul Gubbins* (la belarta konkursulo - ne la bela, arta konkursulo) proponis Lingvolanĉilo kiel solvon; je la kvara matene, ĉiuj konsentis kaj enlitiĝis! De tiam iuj (alilandaj) plendis, ke lingvolanĉilo ne estas ĝusta traduko de Springboard. Ĉu ni traduku la vorton aŭ la ideon?]

La lanĉo ĉe la Ekspozicio sufiĉe sukcesis. Ni disdonis centojn da informpakaĵoj, kun invitilo al la Lanĉ-seminario, enkadre de la Ekspozicio mem. Rezulte, preskaŭ cent interesatoj ĉeestis la seminarion, kvankam okazis aliaj prelegoj kaj similaj je la sama horo. Lastatempe, en marto



2006, ni faris simile en Manĉestro (en norda Anglio) ĉe konferenco/ ekspozicio specife pri fremdaj lingvoj en unuagradaj lernejoj (la londona ekspozicio estis pli ĝenerala). Kaj, paralele kun tiuj agadoj, ni dissendis informon al elektitaj lernejoj kaj lokaj edukinstancoj en Anglio, kun invito peti pluan informon. Ni rimarkis dum la manĉestra konferenco ke pluraj vizitantoj al nia stando diris, "Ho jes, mi legis ion pri tio!" - Bone.

Do, dum 8 monatoj oni elspezis tiom da tempo kaj energio pri tiu projekto, ĉiam laŭ detala kaj ordeca laborplano. Ĉiuj laŭdis la rezulton, laŭ aspekto, profesieco kaj trafeco, sed, sed .......... Ĝis nun neniu lernejo ja adoptis la programon. Pluraj faris seriozajn demandojn al ni kaj ni diskutadas kun du-tri, sed, sed .... Nu, oni povas argumenti ke necesas pli ol 8 monatoj por fari bazajn decidojn pri lernprogramo de tuta lernejo (aŭ loka lernejaro) - prave. Povas esti ke tie kaj tie ĉi tra Anglio pedagogoj studas la pakaĵon kaj pensas "Ĉu eble tio estas la solvo de nia problemo?" Ni esperu ke jes, sed, sed .... Speciala faktoro, kompreneble, estas ke temas pri Britio, kie la plimulto sincere kredas ke la monda lingvo-problemo jam solviĝis, kaj la solvo estas - surprize - la lingvo parolata en Britio! Por multaj, eĉ instruistoj, lingvolernado estas valora eduka aktivo sed ne nepra kondiĉo de pretervivo en la morgaŭa mondo.

Jen la rakonto ĝis nun. Plena informo troviĝas ĉe nia retejo: *www.springboard2languages.org* Ni jam disdonis senpagajn ekzemplerojn de la porinstruista pakaĵo al landaj asocioj kaj edukfakaj organizoj kiuj petis; aliaj rajtas aĉeti kontraŭ la produktokosto (plus sendokosto).

Ni bonvenigas demandojn kaj sugestojn, sed ni ne promesas tujan respondon, ĉar ĝis nun ni ne sukcesis vivi kaj labori sendorme!

## Homa vivo kaj Loĝado

**Recenzo de Zsófia Kóródy pri la libro:**

> *Koutny, Ilona. Angla-Esperanta-Hungara etvortaro pri Homa vivo kaj Loĝado (Poznań: Prodruk, 2005, 156 p. „Celtrafo AEH3")*

Jen nova volumo de la sukcesa etvortaro-serio kun riĉa vortprovizo pri taŭgaj temoj por la ĉiutaga lingvouzo. Tuj videblas, ke la aŭtorino estas

sperta ankaŭ en instruado de fremdaj lingvoj: ŝi elektis la vortojn, esprimojn bezonatajn por perfektiĝemuloj lernantaj E-on, la anglan (aŭ/kaj la hungaran). Verŝajne plej multe ĝojas pri ĝi gekolegoj-instruistoj, kiuj trovas en ĝi ankaŭ interesajn, taŭgajn kompletigajn leksikajn kaj komunikajn taskojn rilatajn al la entitolaj temoj por siaj kursoj, ja pli oftas lernolibroj, taskfolioj por komencantoj ol por progresantoj.

Lernado, parkerigo de vortoj ĝenerale apartenas al la malfacilaj, enuigaj taskoj, sed en la fina parto de tiu vortareto la varieco de ideoj, ekzerctipoj aperas en ĝojiga abundo. Vortprovizaj esploroj, gramatika refreŝigo, prezentoj kaj ludoj, temoj por diskutoj kaj hejmtaskoj bone servas kaj por skriba, kaj por parola ekzercado dum la instruhoroj aŭ hejma uzado. La manko de solvoj (ja ne temas pri lernolibro) kreas defion trovi la ĝustajn vortojn re- kaj retrafoliumante la libreton. Tio kreas travivaĵon similan al solvado de krucvortenigmoj.

Komencantojn eble timigas la ŝajne ne klara strukturo de vortgrupigo ene de la multaj subtemoj de la du ĉefaj partoj (1. *Homa vivo: personaj datumoj; familianoj, parencoj; naskiĝo kaj infanaĝo; junaĝo, geedziĝo; amo, sekso, familiplanado; maljuneco kaj morto; 2. Loĝado: lando, urbo, vilaĝo; akiro de loĝejo; domo, loĝejo; antaŭĉambro, banĉambro; kuirejo; ĉambroj; hejmaj laboroj),* sed post alkutimiĝo pli klariĝas la praktika logiko de vortgrupigoj: la ĉefvortojn akompanas substantivoj, verboj, adjektivoj uzeblaj en la sama kunteksto. Certe povus esti pli da subgrupoj kaj alia logika sinsekvo, sed aŭtoro ja havas la liberecon mem decidi. Kaj ni ne forgesu, ke temas pri tri lingvoj: esprimoj apartenantaj laŭ la ĉefelemento al certa temo en iu lingvo, ne nepre identas kun la alilingvaj versioj. Estus verŝajne troa postulo havi ankaŭ alfabetajn indeksojn, tamen iam indus fari ankaŭ tiujn, ja multaj vortoj, kunmetaĵoj troviĝas ankoraŭ nek en PIV nek en dulingvaj vortaroj. Ĝuste pro tiu manko ni povas aparte ĝoji pri tiu etvortara serio Celtrafo. Kiel la antaŭaj du volumoj: *Lernado kaj Laboro*, respektive *Lingvo kaj Komunikado*, ankaŭ *Homa vivo kaj Loĝado* aspektas malgranda, maldika, tamen ili enhavas po duoble 1200 vortojn kaj esprimojn, inter ili multajn novaĵojn. Mi pensas, ke ne nur mi, instruistino de la hungara, angla kaj E-o deziras la daŭrigon, sed multaj gekolegoj kaj ĉiuj, kiuj intencas riĉigi sian vortprovizon kaj volas aktive uzi E-on.

Ni esperu, ke ni ne devos longe atendi, kaj baldaŭ aperos novaj temoj kun vortrekomendoj de Ilona Koutny, membro de la Akademio de E-o, iama instruisto de la E-fako de ELTE kaj la nuna gvidanto de la Interlingvistikaj Studoj de UAM.



## LA 39-a ILEI-KONFERENCO ESTAS VIA ARANĜO!

# BONVENON!

**39a KONFERENCO DE ILEI**

PARMA 2006 07 25–29



LINGVAJ RAJTOJ, LINGVOLERNADO KAJ EDUKADO POR ĈIUJ

La ĉefa jarkunveno de esperantistaj instruistoj okazos **la 25-29-an de julio 2006 en Parma (Italio)** je la suda rando de la tre fruktoriĉa Padio (la ebena regiono tra kiu fluas la plej granda itala rivero Pado), najbare al la montetoj de la Apeninoj.

Por la konferenco ni planas: inaŭguron, Lingvan Festivalon, unutagan Simpozion laŭ konferenca temo, komitatkunsidojn, proponitajn prelegojn de niaj samideanoj kaj invititaj gastoj, seminarion de E-literaturo, seminarion de InterKulturo kaj aparte pagendan bankedon — adiaŭan komunan vespermanĝon — en lukseca etoso.

La konferenco okazos en la *Instituto Salesiano San Benedetto*. Ĝi situas en la urbocentro ne malproksime de la katedralo kaj de la *Monaĥejo "San Giovanni"*, ĉirkaŭ 20 minutojn piede de la stacidomo.

La organiza komitato al Vi proponas:

- *Konatiĝu kun la mondo de edukado*
- *Plibonigu Viajn instrukapablojn*
- *Ĝuu sciencan simpozion pri la konferenca temo*
- *Kolegecan etoson en intima rondo*
- *Variajn kaj instigajn prelegojn*
- *E-kursojn kaj agrablajn vesperajn aranĝojn*
- *Moderkostan loĝigon kaj abundan programon*
- *Festivalon de lingvoj kaj kulturoj*
- *Tuttagan ekskurson survoje al UK en Florenco*

***Ĝis revido, en la 39-a ILEI-konferenco en Parma, Italio!***

Ĉiuj informoj estas en nia retpaĝo www.ilei.info aŭ ĉe la estrarano pri konferencoj *Aida Čižikaitė aidute@mail.lt; Zamenhofo 5, LT-44287 Kaunas, Litovio; (+370) 37 208503, (+370) 616 15991* aŭ ĉe la itala sekciestro de ILEI *Luigia Oberrauch-Madella, silkovojo@aliceposta.it.*

## Simpozio en Parma dum la 39-a Konferenco

**pri lingvaj rajtoj, lingvolernado kaj edukado por ĉiuj**

*Parma, la 27-a de julio 2006-a*

La simpozio, organizita kunlabore kun la universitato de Parma, celas pritrakti kaj esplori tiujn ĉi subtemojn, kiuj estas ankaŭ la subtemoj de la ĉi-jara ILEI-konferenco: *Lingvaj rajtoj en la lernejoj; Edukmodeloj en plur-etnaj socioj; Modeloj kaj ekzemploj de interkultura edukado; Kvalitaj lingvoinstruistoj por kvalita lingvolernado; Instruado de lingvoj kiel formo de sociigo, E-o en lernejoj kaj interkultura komunikado.*

Subteno al lingvaj rajtoj kaj lingva egalrajteco, progresigo de lingvolernado kaj edukado por ĉiuj estas ekzistokialoj de ILEI kaj gvidideoj de ĝia agado. Tiuj ideoj estas ankaŭ kernaj por la homaj rajtoj kaj homara evoluo, pri kiuj UN kaj Unesko tiomfoje deklaraciis kaj rezoluciis. Pro tio ankaŭ ne-esperantistaj medioj pli kaj pli interesiĝas pri ĉi tiuj temoj de lingvo-politiko, lingvaj homaj rajtoj, rezonado pri la politiko de instruado de fremdaj lingvoj en lernejaj sistemoj.

Oni komencas trovi pli da materialo pri lingva imperiismo kaj pri la kostoj de instruado de difinitaj fremdaj lingvoj en naciaj lingvoj ol en E-o. Certe oni ree kaj ree venas al temoj de interkultura edukado, diverseco de kulturoj, neceso protekti malfortajn lingvojn kaj kulturojn en la eldonaĵoj de Unesko. Ne estas mirige, ke ankaŭ esperantistoj havas ion por diri al la mondo en ĉi tiu kunteksto pri la utilo de E-o, kaj ion por lerni el la mondo, kiu pritraktas ĉi tiujn temon.

Same facile, do, oni povas klarigi, kial la universitato de Parma trovis nature, kunlabori pri ĉi tiu temo kaj disponigi siajn salonojn kaj aktivigi siajn profesorojn. Ankaŭ konataj italaj kaj internaciaj sciencistoj (inter kiuj konata fakulo pri pedagogio kaj eksa vic-ministro pri edukado en Italujo) trovis nature doni sian nomon por la scienca komitato. La legantoj de IPR verŝajne ne konas la italajn prelegantojn, sed povas juĝi pri la nivelo de la aranĝo pere de ĉi tiuj titoloj de prezentoj: Federico Gobbo: *Instruado de Esperanto kiel formo de sociigo kaj edukado al diverseco*, Humphrey Tonkin: *Fremdlingva studado en Usono: Demandoj kaj problemoj.*

*Renato Corsetti*
*Helpanto de la organizantoj*



**Pliaj detaloj pri la Simpozio:**
La simpozio okazos la 27-an de julio 2006 en la aŭlo Meazzi de la Universitata Departemento pri Fremdaj Lingvoj (*aleo S. Michele, 11, IT-43100 Parma. Tel. (+39) 521 034716*)

Federazione Esperantista Italiana

*Kunorganizantoj:*

- ILEI
- Itala sekcio de ILEI
- Parma Universitato
- Komunuma Administracio
- Skabeno de la politikoj por Infaneco kaj Lernejo
- Provinca Administracio
- Komerca Ĉambro

Komunuma Administracio. Skabeno de la politikoj por Infaneco kaj Lernejo
Provinca Administracio
Komerca Ĉambro

*Scienca komitato*

- Prezidanto: *Luciano Corradini*, profesoro pri pedagogio, Universitato Roma 3, eksa vic-ministro pri edukado
- Sekretario: *Michele Gazzola*, esplor-asistanto pri lingva ekonomio, Universitato de Ĝenevo

*Organiza komitato*

- Prezidanto: *Radojica Petrović*, prezidanto de ILEI
- Sekretario: *Luigia Oberrauch Madella*, prez. de la itala ILEI-sekcio Membroj: *Aida Čižikaitė, Mauro La Torre, Laura Brazzabeni, Ermanno Tarracchini*

Prelegi oni povas en la lingvoj: E-o, la itala, litova, angla, franca, germana (kun traduko al E-o); se oni volas prelegi en aliaj lingvoj, oni devas mem prizorgi, ke estu traduko al E-o. Ĝis la 31-a de majo 2006 oni sendu sian aliĝilon al la organizantoj kaj noticon de la artikolo. La organiza komitato, ricevinte la aliĝilon, sendos informon pri partopreno ĝis la 20-a de junio 2006. La organiza komitato la programon de la konferenca simpozio sendos ĝis la 30 de junio 2006. Nepra estas resumo en E-o, se oni prelegas en alia lingvo. Oni planas la resumojn (ĝis 500 tajperoj) de la simpoziaj kontribuoj publikigi en konferenca libro, elektitajn artikolojn en IPR de la jaro 2007 kaj la plej elstarajn proponi al LPLP.

## Lingva Festivalo dum la 39-a Konferenco

Lingvo estas la rimedo per kiu oni ekkonas mondon kaj transdonas siajn pensojn al la aliaj. Plej verŝajne ne ekzistas pli interesa kaj pli mistera mondo, ol la mondo de la lingvoj. Ni ĉiuj jam rimarkis, ke la samajn aferojn oni vortigas diversmaniere, depende de la lingvo. Tamen, estas bezonata ankaŭ ponto inter multaj esprimeblecoj.

Almenaŭ dum lingvaj festivaloj, kiuj okazas en diversaj E-aranĝoj, taskon de tiu ponto plenumas E-o. Tre bone, se ni havas eblecon aranĝi lingvan festivalon kvazaŭ donacon de esperantistoj al la loka publiko. Tiukaze la lokaj loĝantoj ne nur ĝuas buntecon de la lingva mondo, sed vidas ankaŭ la valoron de la Zamenhofa lingvo.

Tre interesaj estas lingvaj festivaloj, kiuj daŭras dum kelkaj tagoj, ekzemple „Ĉielarko" en Ĉeboksari en Ĉiuvaŝio, Ruslando. Tamen ankaŭ valoras la penon dediĉi duontagon dum iu alia E-aranĝo, se ni havas spektantojn.

ILEI jam dum kelkaj konferencoj klopodis havi la festivalon kaj ĉiam ili estis sukcesaj. Kompreneble, ĉiam malsamaj, depende de lokaj kondiĉoj.

Ankaŭ dum la 39-a ILEI konferenco en Parma (Italujo) okazos Festivalo de lingvoj kaj kulturoj. Laŭ programo ĝi estas antaŭvidata la 28-an de julio (vendrede) posttagmeze.

***Kio estas la festivalo?*** La LF estas donaco de esperantistaj instruistoj kaj aliaj partoprenantoj de la 39-a ILEI-konferenco al la urbanoj kaj tio estas iuspeca kunlaboro de ILEI kun la urba komunumo. Tiamaniere ILEI volas danki la lokajn gravulojn pro la apogo de la konferenco. Ĝuste pro tio LF estos anticipe anoncita, senpaga, libere vizitebla aranĝo dediĉita al lokanoj.

***Kie okazos la festivalo?*** La LF okazos en la korto de la Biblioteko Civica aŭ en la parko kiu tute apudas al la Biblioteko Guanda depende de vetero kaj teknikaj kondiĉoj.

***Kiu partoprenos en la festivalo?***. Unuflanke diverslandaj esperantistoj, partoprenantoj de la 39-a ILEI-konferenco prezentos siajn lingvojn kaj kulturojn. Aliflanke – lokaj loĝantoj, kiuj povos ĝui la prezentojn kaj konatiĝi kun diversaj lingvoj kaj plivastigi siajn interkulturajn konojn.

***Kiel funkcios la festivalo?*** La LF similos al foiro de interesoj, kie ĉiu rajtas prezenti siajn landon kaj lingvon. Estos invitataj ĉiuj partoprenantoj de la 39-a ILEI-konferenco. Ĉiu prezentanto havos 30 minutojn ĉe speciale aranĝita stando kaj rajtos prezenti sian lingvon laŭ sia bontrovo. Eblas tute simple prezenti, veni vestita per naciaj vestaĵoj, kunporti naciajn manĝojn, aŭskultigi nacian muzikon, instrui naciajn dancojn kaj multon, multon pli.

***Kiel aliĝi al la festivalo?*** La LF estas organizota de ILEI, do en la elektronika aŭ papera aliĝilo bonvolu noti, kiun lingvon Vi emus prezenti kaj kiujn ilojn Vi bezonos. Al la LF ne necesas aliĝi, se Vi volas nur spekti ĝin.

***Kiel kontakti la organizantojn?*** Vi estas bonvena skribi al *Vladka Chvátalová* sciuro@hotmail.com, al *Aida Čižikaitė* aidute@mail.lt, aŭ *Luigia Oberrauch Madella* silkovojo@aliceposta.it.

***Ne perdu la eblecon prezenti vian identecon al vasta mondo!***

Ĉiuj informoj pri la konferenco, simpozio kaj Lingva Festivalo troviĝas en nia retpaĝo www.ilei.info aŭ ĉe estrarano pri konferencoj *Aida Čižikaitė* *aidute@mail.lt; Zamenhofo 5, LT-44287 Kaunas, LITOVIO; +370 37 208503, +370 616 15991.*

## El la landoj kaj sekcioj...

### Burundio

Komence de aŭgusto 2006 okazos en Rumonge, Burundio, la unua kongreso de la nova asocio ANEB (*Association Nationale d'Espéranto au Burundi*). Tiu kongreso, ebligita de subvencio de la Afrika Komisiono de UEA, daŭros 5 tagojn. Ĉar temas pri kongreso aranĝata de lokaj esperantistoj, kiuj neniam ĉeestis naciajn kongresojn, partopreno de eksterafrikaj esperantistoj, kiuj povus doni ekzemplojn de parolata E-o, prelegi, gvidi kurson, ekzameni, ktp., estus vere tre bonvena. Se vi pretas proprakoste partopreni tiun kongreson, la sperto estos por vi neforgesebla kaj vi eniros la historion de Esperanto en Burundio. Kontaktu:

*SABIYUMVA Jérémie, BP:170 RUMONGE, BURUNDI. Tel: (+257)733052, <jerrybs21@yahoo.fr>*

### Danlando

En la semajno inter januaro kaj februaro 2006 en Kopenhago okazis E-kurso por komencantoj kun 10 partoprenantoj, daŭriga kurso por 9 komencintoj kaj metodika trejnseminario por 10 instruistoj kaj instru-

emuloj, ĉio organizita de Dana E-Asocio (DEA) kaj ties prezidanto *Ileana Schrøder* kunlabore kun ILEI. Instruis *Radojica Petrović*. Krom danoj, partoprenis gasto el Argentino kaj alinaciaj danlandanoj venintaj el Aŭstrio, Bosnio, Britio, Kroatio, Pollando kaj Serbio. Du partoprenintoj de la komenca kurso daŭrigos la lernadon per *lernu.net*, kaj la ceteraj partoprenos daŭrigan kurson en Kopenhaga E-klubo, kie jam daŭras alia kurso por progresantoj. 14 membroj de DEA, kiuj okupiĝas aŭ interesiĝas pri instruado, aliĝis al ILEI kaj decidis fondi danan sekcion de ILEI kun sekciestro *Arne Casper-Mortensen*. Semajnofine DEA partoprenis en la Dana Socia Forumo sub titolo: "Alia mondo eblas". Inter pli ol 100 atelieroj, DEA aranĝis du emfazante precipe la lingvajn homajn rajtojn: "Lingvomortigo" prezentitan de *dr.phil. Tove Skutnabb-Kangas*, kaj "Ĉu la tutmondigo signifas, ke la dana lingvo malaperos?" kaj "Lingvoj de enmigrintoj en Danlando" prezentitajn de *prof. Robert Phillipson* en kunlaboro kun *Ole Stig Andersen*, kiu reprezentis la danan UN-Asocion. La ĉeestantoj estis treege interesataj kaj faris multajn demandojn al la prelegantoj. DEA aranĝis ankaŭ budon kaj disdonis flugfoliojn pri E-o kaj enkondukan materialon.

*Laŭ retlistaj informoj de Radojica Petrović kaj Ileana Schrøder*



*La komencantoj kun la atestiloj.*



## Germanio

Jam ekde pli ol kvin jaroj la **Interkultura Centro Herzberg** (ICH)/ **Germana E-Centro** (GEC) organizas studsesiojn por klerigado de E-instruantoj/ instruistoj. Dum Pasko okazis la *Printempa Semajno Internacia* en la urbeto St. Andreasberg, kiu same kiel Herzberg troviĝas en la Harz-montaro kaj oni eluzis tion por prezenti la variajn studofertojn de la centro al la PSI-partoprenantoj. Dum la tuta semajno okazis prelegoj kaj laborrondoj pri metodologio, interlingvistiko, gramatiko, literaturo kaj aliaj temoj, kiuj koncernas la instruadon de E-o. Estis ĝojige, ke multaj partoprenantoj povis tiamaniere havi enrigardon en la trejnprogramon kaj multaj sekvis kun granda intereso la fakprelegojn interalie de *Věra Barandovská-Frank, D-ro Rudolf Fischer, Stefan MacGill, François Hounsounou* kaj *Prof-ro Paulo Nascentes*. La organizantoj planas daŭrigi la intensan kunlaboradon inter la klerigcentro kaj ILEI ankaŭ estonte ofertante UEA/ILEI-ekzamenojn. *Zsofia Korody*



*Ekzamenantoj Peter Zilvar, Stefan MacGill kaj ekzamenato Sebastian Kirf (dekstr.)*

La paska **sesio de la internaciaj ekzamenoj de UEA/ILEI**, verŝajne estis la plej granda de la lastaj jaroj. Prezentis sin ses elementaj kaj ses mezaj kandidatoj el Germanio, Belgio, Francio kaj Brazilo. La kulturaj konoj kutime pruviĝas defia parto de la ekzamenoj; en ĉi tiu sesio la kandidatoj relative bone plenumis la bezonojn, ĉar la plimulto el ili atingis la

ekzamenojn tra la studsesioj de la Germana E-Centro en Herzberg, dum kiuj la kulturo, historio kaj literaturo estas forte emfazataj. Tiu centro organizis la ekzamenan sesion kadre de PSI, kaj samtempe plian stud-sesion por siaj kursanoj. Ekzamen-rezultoj estos sciataj post rekontrolo de la taskaro flanke de la IEK. *Stefan MacGill*

## Pollando

La unua tago de la printempo estas por polaj lernejanoj okazo vagabondi dum la leciontempo. Sed tio tute ne interesis la lernantojn de la ILEI-patronata lernejo en Ĉajovice apud Krakovo. Tiun tagon jam duafoje okazis en la lernejo debato pri la VALOROJ, kadre de la EU-projekto *'Spring Day in Europe' 2006*. Por partopreno en la pasintjara debato pri TOLEREMO la lernejo ricevis grandformatan atestilon kun subskriboj de 6 EU-altranguloj.

La ĉi-jaran aranĝon observis lokaj aŭtoritatanoj kaj edukistoj. ILEI estis reprezentata de la pola sekciestrino kaj ILEI-komitatanino, *Maria Majerczak*. La seriozan diskuton inter la infanoj pri la ĉi-jara temo 'AMO' lerte,



*Instruistino Anna Żyła gvidas la diskuton*



altnivele kaj tre interese gvidis du junaj instruistinoj de ĉi tiu lernejo. La diskuto enhavis ankaŭ interkulturajn aspektojn.
La direktorino de la lernejo plurfoje emfazis la valoron de E-o kaj la rolon de ILEI en la lernejo de Ĉajovice.
Oni povas trovi pli da informoj pri La Printempo-Tago en Eŭropo en kelkaj retejoj, i.a. en la plurlingva:
*http://futurum2005.eun.org/ww/pl/pub/futurum2005/index_15mins.htm*

*Maria Majerczak*

## Por via notlibro

### Juna amiko 2006 mult-kontinenta

Komence de aprilo ILEI ekspedis la unuan numeron de *Juna amiko* por 2006, kun kovrila bildo de la italo kiu perpiede transiros la tutan Eŭrazion. Franca fabelo, kuba legendo, germana paska kutimo, tajvana sinprezento, litova kanto kaj brita reklam-projekto figuras, inter kutimaj bildstrioj, krucenigmoj kaj serioj. Paĝoj por etuloj kreskis de 2 ĝis 3. Pagitaj abonoj ĝis aprilo sumiĝas je ĉ. 320; sed por la financa bonfarto de la revuo ni atendus preskaŭ 400, por atingi, pere de kolektivaj remendoj, jarfinan sumon de 800. Perantoj en 30 landoj atendas vian abonadon; vi tuj ricevos la unuan aperintan numeron.

Vizitu ankaŭ la revuan retejon ĉe la biblioteko en <*www.lernu.net*>. Tie vi trovos konkurs-respondojn, multajn artikolojn kaj la Esperantajn tradukojn de la anglaj reklamiloj kiuj aperas fine de la nuna revuo.

### "Esperanto por Progresantoj"

Sub tiu provizora sed ŝanĝota titolo, ILEI planas eldoni lernolibron verkitan de Judit Felszeghy el Hungario. La verko kompiliĝis kiel kurslibro por aspirantoj al la hungaraj ŝtataj lingvo-ekzamenoj. La origina enhavo estas nun internaciigata, tiel ke ĝi estu plene Esperant-lingva verko. Ĝi ampleksos ĉ. 112 grandformatajn paĝojn kaj estos teme bazita. El inter la 13 temoj estas: Loĝloko, Manĝoj, Vojaĝoj, Kulturo kaj ŝatokupoj, Sana vivo, Esperantio kaj la mondo, k.s. La libro aperigos multajn elĉerpaĵojn el

Esperantaj revuoj kaj literaturaj verkoj. Krom tiuj legaĵoj, la libro prezentos leksikajn, gramatikajn kaj teksto-komprenajn ekzercojn, paroligajn demandojn, rol-ludojn ks. Parto de la enhavo estos kolore presita. La atendebla vendo-prezo estas ĉ. 13 EUR, ni ofertos al revendistoj la kutimajn rabatojn. ILEI volas taksi la merkaton por tia verko por fiksi la eldonkvanton. Ni sekve turnas nin al libroservoj, centroj kaj niaj landaj sekcioj kun la peto sciigi al ni vian atendeblan post-aperan mendon kaj vian takson de la tuta sumo, kiun vi povus vendi.

Bv. respondi al <*stefan.macgill@gmail.com*> kaj nia komisiito Anna Besenyei <*esperanna@gmail.com*>

## Ne forgesu nian ligan libroservon

Reaperis la *Manlibro pri instruado de Esperanto*, kaj nia libroservo en Budapeŝto povas liveri ĝin, je prezo de € 7,50. Ĝi donas praktikajn konsilojn por kursgvidantoj, informojn pri leciontipoj, lecionplanoj, instruformoj, ekzercotipoj, diversaj metodoj, kune kun apogaj kaj ekzemplaj materialoj. Ne hezitu, la dua eldono povos elĉerpiĝi samrapide kiel la unua!




*Okulo*: Jen bona maniero prezenti Esperanton al infanoj inter 7- kaj 11-jaraj. Okulo kaj Zumplo gvidas etulojn et-paŝe tra la unuaj temoj de E-o. La 44-paĝa libro havas kolorajn paĝojn kaj estas bunte ilustrita. € 4.50

*Gvidilo por Okulo* helpas al gepatroj, instruistoj aŭ kursgvidantoj bone uzi la supran lernilon. Kun po-paĝaj gramatikaj resumoj, vortlistoj, konsiloj kaj suplementaj ekzercoj. 44 paĝoj. € 4,50

*Tendaraj tagoj, kajero II*. Bona daŭrigo de *Okulo*. Prezentas aron da esperantistaj tendaranoj kiuj amikiĝas kaj praktike uzas la lingvon. Dialogoj, skeĉoj, legaĵoj, aventuroj de la spiono 005, ekzercoj, ĉio kun logika gramatika strukturo subkuŝanta. 72 p. € 6,90



*Tendaraj tagoj III*. La supernivela daŭrigo kaj kompletigo de la tendara vivo. Konvena ankaŭ por pli aĝaj studantoj; ĝi akcelas progreson preter la komencaj kaj mezaj lingvo-niveloj. 76 p. € 6,90

*Fantaziaĵoj kaj kantoj por infanoj*. Kun muzik-notoj kaj ilustraĵoj. 98 p. € 3,60

Mendu rete ĉe <*esperanna@gmail.com*> kopie al <*stefan.macgill@gmail.com*>. Letere al ILEI, *Anna Besenyei, pf 193, HU-1368 Budapest, Hungario*. Ni aldonos al viaj libroj fakturon kun paginstrukcioj. La prezoj samas kiel ĉe UEA, sed ĉe ni ili inkluzivas la sendokostojn. Sesona rabato ekde 3 libroj (ajna titolo). Kutima triona rabato por libroservaj mendoj.

## TORPED-o 2 en Germanio

*2-a Tutlanda Oktobra Renkontiĝo Pedagogia, 29.09-03.10.2006, Herzberg*

Ĝi estas trejnkurso de ICH/GEC kaj ILEI.

Kadrotemo: instrumaterialoj, instruhelpiloj kaj rilataj instrumetodoj.

Ni atendas ĉiujn, kiuj interesiĝas pri E-instruado, mem instruis, instruas aŭ planas instrui, kiuj serĉas taŭgajn instrumaterialojn por siaj kursoj, havas jam spertojn aŭ ŝatus spertiĝi, interŝanĝi opiniojn pri faktemoj, ktp.

Ĉi-jare ĉefe temos pri lernolibroj, instrumaterialoj, instruhelpiloj por E-instruado: kiu lernolibro por kiu celo, kiu aĝgrupo; kiu metodo por kiu lernolibro?

Krom fakprelegoj, konigo de materialoj ekz. de siaj aŭtoroj okazos forumo por spertinterŝanĝo, prezentado de metodoj kaj materialoj de kontribuemaj partoprenantoj.

Partoprenkotizo (por membroj de GEA kaj ILEI): 30 EUR (ĝis la 30-a junio), 35 EUR (ĝis la 31-a aŭg.), 40 EUR (poste). (Por ne-membroj 5 EUR krompago.)

Viajn preleg- kaj kontributemojn bv. anonci al Zsofia Korody (GEA-komisiito por instruado): <*zsofia.korody@esperanto.de*>

**Ekzamenoj**

GEA/GEI ekzamenoj okazos dum TORPED-o 2:


- B-ekzameno pri lingva kapableco
- C-supera ekzameno pri lingva kapableco

Laŭbezone estos organizebla ankaŭ UEA/ILEI ekzamenoj (elementa kaj meza niveloj). Bv. anonci vin indikante la deziratan ekzamen-tipon kaj nivelon ĉe: Interkultura Centro Herzberg: <*esperanto-zentrum@web.de*>

**Intensa somera lingvokurso kun observado kaj instrupraktiko** *(22-28 julio 2006), Herzberg, Germanio*

Germana E-Centro/Interkultura Centro Herzberg organizos intensajn somerajn lingvokursojn en pluraj niveloj. Ili estos malfermataj por spektemuloj, praktikemaj instruantoj. Oni povos veni por:
- observi la instruhorojn, la uzatajn metodojn,
- spertiĝi pri didaktiko,
- analizi, priparoli la vizititajn instruhorojn kun spertaj E-instruistoj,
- provi la propran instrukapablon instruante parttempe la kursanojn.

Interesiĝantoj bv. anonciĝi ĉe Zsofia Korody (GEA-komisiito por instruado) <*zsofia.korody@esperanto.de*>



*Provleciono dum la metodika seminario en Danlando (vd. p. 31-32)*



## LABORKOMISIONOJ

**Azia agado:** Rob Moerbeek
**Ekzamena:** Duncan Charters (prez.), Katalin Kováts (vicprez.), Bill Maxey (sekr.), Probal Dasgupta, Gbeglo Koffi, Mireille Grosjean
**Elekta:** Maritza Gutiérrez (kunvokanto), Ana Montesinos de Gomis, Aurora Bute
**Kontrola:** Ulla Luin, Bengt Jonsson, anstataŭanto: Lars Forsman
**Lerneja:** Carola Antskog, Luigia Madella, Ermanno Tarracchini, Mihai Trifoi
**Regulara:** Marija Beloŝeviĉ, Rob Moerbeek, Atilio Orellana Rojas
**Terminara:** Maŭro La Torre, Miroslav Malovec

## KUNLABORANTAJ INSTITUCIOJ

**EEU**: *Eŭropa Esperanto-Unio*. Komisiito pri instruado kaj rilatoj kun ILEI: **Carola Antskog**, Brokärrvägen 89, FI-25700 Kimito, Finnlando, *cantskog@kolumbus.fi*
**E@I** (*Esperanto ĉe Interreto*, *www.ikso.net*): faka sekcio de **TEJO** (*www.tejo.org*, poŝtadreso ĉe UEA).
**FIPLV** *(Internacia Federacio de Instruistoj de Vivantaj Lingvoj):*
Reprezentanto de ILEI: **Jennifer Bishop**, *esperanto@Education.monash.edu.au*
**IEI:** *Internacia Esperanto-Instituto, Riouwstraat 172, NL-2585 HW Den Haag, Nederlando.*
**TEJO**: Observanto de TEJO ĉe ILEI: **François Hounsounou** (adr. sur p. 40., Benino).
**UEA:** *Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando*. *www.uea.org*. Observanto de ILEI ĉe UEA: **Radojica Petrović**. A-komitatano el ILEI: **Atilio Orellana Rojas**. Observanto de UEA ĉe ILEI: **Claude Nourmont**. Reprezentanto de ILEI en la Afrika Komisiono de UEA: **François Hounsounou**
**UNESKO** (en operaciaj rilatoj). Reprezentantoj de ILEI: **François Lo Jacomo**, *72, quai de la Loire, FR-75019 Paris, francois.lojacomo@wanadoo.fr*; **Monique Arnaud**, *Ecole Chemin de l' Espéranto, Les Pelloux, FR-05500 Benevent et Charbillac, monique.arnaud@tiscali.fr*; **Jean-Pierre Boulet**, *17 Av. de la Dordogne, FR-63800 Cournon d'Auvergne, tel.: (+33) 4 73 84 90 60*; **Mireille Grosjean**, *Temple 20 pf. 9, CH-2416 Les Brenets, tel/fakso: (+41 32) 932 18 88*, *mireille.grosjean@rpn.ch*

## MEMBRIĜO AL ILEI KAJ PAGADO POR ALIAJ SERVOJ

Membreco kostas 18 EUR en A-landoj (laŭ UEA-difino) kaj 9 EUR en B-landoj, kun ricevo de 4 numeroj de IPR jare. Kun aliro nur al reta versio, membreco kostas 4 EUR (A) kaj 2 EUR (B). Bonvenaj estas donacoj al la fondaĵoj de ILEI, konferencaj pagoj kaj abonoj por Juna amiko. Sekciestroj en trideko da landoj akceptas membrigojn kaj donacojn; simile, perantoj por Juna amiko akceptas abonojn enlande. Por pagoj rekte al la internacia ILEI informu skribe al la kasisto de ILEI: **Sjoerd Bosga**, *Tråddragargatan 27D, SE-723 37 Västerås, Svedio. Tel.: (+46 21) 41 70 45, sjoerd@esperanto.se*.

La pagoj povas okazi pere de konto de ILEI ĉe UEA, aŭ al la sveda konto.

* Pagoj al konto de ILEI ĉe UEA: Pri pagmanieroj vidu informojn en la Jarlibro de UEA. Atentu pri aldono de sumo por bankkostoj. Indiku vian nomon kaj landon, mallonge la celon de la pago, kaj unu el la tri kontoj ilek-a (ĝenerala), juna-l (Juna amiko), pike-b (projekto Interkulturo).

* Pagoj al la sveda bankkonto: El Svedio pagu al konto 8327-9, 994 515 014-3 ĉe Föreningssparbanken. El aliaj landoj pagu al IBAN SE56 8000 0832 7999 4515 0143 kun BIC/SWIFT kodo SWEDSESS. Aldonu 6 eŭrojn por svedaj bankkostoj se vi pagas el ekster Eŭropa Unio.

* Simpla abono de IPR sen membreco: 18 EUR. Reklamtarifoj por IPR: 180 EUR por plena, 110 EUR por duona kaj 70 por kvarona paĝoj. Tio inkluzivas bazan grafikan pretigon: kostojn de ekstra pretigo oni rajtas fakturi. Sekcioj reklamante edukajn projektojn rajtas peti trionan rabaton.

ILEI estas jure registrita ĉe la Komerca Ĉambro en Den Haag sub numero 27.181.064.
Hejmpaĝo de ILEI: *http://www.ilei.info*


## REDAKCIAJ INFORMOJ

**Respondeca eldonanto** (verantw. uitgever): Iwona KOCIĘBA, *Graaf de Fiennesln 54, BE-2650 Edegem.*
**Presado:** Flandra Esperanto Ligo, *Frankrijklei 140, BE-2000 Antwerpen, tel: (+32-3)-234 34 00.*
**Redaktejo:** NÉMETH József, *HU-8531 IHÁSZ, Fő u. 41/5.* Rete: <*jozefonemeth@yahoo.com*>, *http://www.ilei.info/ipr/;* tel: *(+36-89) 356-050.* La revuo aperas ankaŭ kasede registrita por leghandikapuloj.
Informas: Rob MOERBEEK, *Zwaansmeerstraat 48, NL-1946 AE Beverwijk*, <*r.moerbeek@wanadoo.nl*>.
La numeron ni sendis al la presejo la 29-an de aprilo 2006, **redaktofino por la sekva numero: 15.08.2006**.

# SEKCIOJ

**Albanio:** Vasil Pistoli, c/o Bardhyl Selimi, Rr. Maliq Muco, Pall. 50, ap. 3, AL-Tirana, *selimibardhyl@yahoo.com*

**Aŭstralio**: Penny Vos, 511 Wyndham Lane/Kanoona, Candelo NSW AU-2550, *penivos@yahoo.com*

**Belgio:** Iwona Kocięba, Graaf de Fiennesln 54, BE-2650 Edegem, *iwona.kocieba@telenet.be*

**Brazilo:** Antonio Felix da Silva Rua Engenheiro Francisco Azevedo, 243, Sumarezinho - São Paulo – SP, BR-05030-010, *ileibr@linguauniversal.com.br*

**Britio:** Tellier Angela, 10 Marina Gardens, GB IP11 2HW Felixstowe, Suffolk, *angela@esperantoeducation.co.uk*

**Ĉeĥio:** Jana Melichárková, CZ-696 02 Ratíškovice 938, *melicharkova@quick.cz*

**Ĉinio:** Zhang Danchen, General Foreign Languages Dept., 29-34 North Part, Huazhong Normal University, CN-430070 Wuhan, *zdchen@public.wh.hb.cn*

**Finnlando:** Carola Antskog, Dragsfjärdvägen 690, FI-25700 Kimito, *cantskog@kolumbus.fi*

**Francio:** Joseph Catil, 5, rue des Calabres, FR-69330 Meyzieu, *joseph.catil@wanadoo.fr*

**Germanio:** Michael J. Scherm, Von Thürheimstr. 47, DE-89264 Weissenhorn

**Hungario:** József Németh, Fő u. 41/5, HU-8531 Ihász, *jozefo.nemeth@gmail.com*

**Irano:** Hamzeh Ŝafii, P.O. Kesto 17765-184, IR-Teheran, *ilei.ir@esperanto.org*

**Italio**: Luigia Oberrauch Madella, via Prampolini 8, IT-43100 Parma, *silkovojo@aliceposta.it*

**Japanio:** Isikawa Tieko, 103, Tate 1-6-6, Siki, Saitama JP-353-0006, *isksanjo@ff.e-mansion.com*

**Katalunio**: Pedro M. Martin Bututxaga, Arnau Gatell 2-4-2, ES-17300 Blanes, *ileicat@hotmail.com*

**Korea Resp.**: CHO Sung Ho, Department of Biology, Inha Universitato, Incheon KR-402-751, *shcho@inha.ac.kr*

**Kroatio/KEL**: Marija Jerković, Jarunska 6, HR-10000 Zagreb, *mjerkovic@net.hr*

**Kroatio/KEU**: Ivan Bekavac-Basić, Kuŝlanova 59, HR-10000 Zagreb, *ilei_kroatio@teacher.com*

**Kubo:** Marta Alonso Gutiérrez, Malecón 659 entre Belascoaín y Gervasio; CU-10200 Ciudad de La Habana, *kubesp@enet.cu*

**Nederlando:** Atilio Orellana Rojas, Riouwstraat 172, NL-2585 HW Den Haag, *iei001@tiscali.nl*

**Norvegio:** Anne-Karin Bondhus, Baldersveg 3C, nr 17, NO-7033 Trondheim, *anne.k.bondhus@itk.ntnu.no*

**Pollando:** Maria Majerczak, ul. Armii Krajowej 7, m. 122, PL-30 150 Krakow, *mmajerczak@gmail.com*

**Rumanio:** Mihai Trifoi, Bl. 1/ap.3, Jud. Covasna, RO-527118 Bixad, *trifoi@honoris.ro*

**Rusio:** Irina Gonĉarova, Moloeznaja 38-10, Odincovo 2, Mosk. obl. RU-143000, *mirina@online.ru*

**Svedio:** Siv Burell, Lekstorpsv. 46 E, SE-443 41 Graabo, *siv.burell@telia.com*

**Svislando:** Mirelle Grosjean, Grand-rue 9. Pf. 9, CH-2416 Les Brenets *mireille.grosjean@rpn.ch*

**Togolando:** Attiogbe-Agbemadon B., Mensah, T. I. E. To, B.P. 13169, Lome-TOGO, *esp.togo@cafe.tg*

**Ukrainio:** Nina Daniljuk, prospekt Sobornosti, 32-108, Luck-26, UA-43026, *nina_daniljuk@ukr.net*

**Usono kaj Kanado:** Doroteo Holland, 5140 San Lorenzo Dr, Santa Barbara, CA 93111-2521 (US), *dorothyh@west.net*

**Venezuelo:** Andrés Turrisi, Cen.Res.Puerta del Este.Torre, Oeste, piso15, ap.153, Av.Madrid, VE-1070 La California Norte, Caracas, *andesp@internet.ve*

# REPREZENTANTOJ

**Armenio:** Lida Elbakjan, Moldovakan 26/2, kv.52, AM-375062 Erevan, *LIDELB@freenet.am*

**Barato/Hindujo:** Venkatesh Reddy, No. 216, Off main Road, Whitefield, Bangalore 66, Karnataka, *esperovr@yahoo.co.in*

**Benino**: François Hounsounou, BP 226 BJ-Lokossa-Mono, Rep du Benin, West Afrika, *hounfranc@yahoo.fr*

**Bosnio kaj Hercegovino**: Nimeta Kulenoviĉ, Branica Sarajeva 15/V, BA-71000 Sarajevo

**Ĉilio:** Héctor Campos Grez, Casilla 903, CL-3340000, *hecg@uea.org*

**Danio:** Arne Casper-Mortensen, Bryggervangen 70, 4. tv. DK-2100 Kobenhavn, *arnecasper@dbmail.dk*

**Estonio:** Helgi Hromova, Pk. 623, EE-12602 Tallinn

**Islando:** Loftur Melberg Sigurjónsson, Traðarberg 13, IS-221 Hafnarfjörður, *loftur@skyrr.is*

**Israelo:** Gian Piero Savio, P.O.K.386, IL-84965 Omer, *gpsa@uea.org*

**Kongo DR:** Ngangu Nduantoni-Bakidila, B.P.13, CD-Lukala, Bas-Zaïre

**Kostariko:** Hugo Mora Poltronieri, Apartado 4981, CR-1000 San José, *tikoguau@gmail.com*

**Litovio:** Algimantas Piliponis, Kavoliuko 3-93, LT-04325 Vilnius, *piliponis@centras.lt*

**Meksiko:** José de Jesús Corrales C., Belice 116, Fraccionamiento Guadalupe, Durango, Dgo. *jdjcorrales@yahoo.com.mx*

**Nov-Zelando:** Gwenda Sutton, 12C Herbert Gardens, 186 The Terrace, NZ-6001 Wellington 1, *gwenda.s@ihug.co.nz*

**Portugalio:** João Jose Santos, Apartado 123, PT-5301-902 Bragança, *joaojosesantos@gmail.com*

**Serbio kaj Montenegro:** Radojica Petrović, Bul. oslobodjenja 36, SCG-32000 Ĉaĉak, *radp@ptt.yu*

**Slovenio:** Marija Zlatnar-Moe, Miliĉinskega 66, SI-1000 Ljubljana, *Marija.Zlatnar@guest.arnes.si*

**Uzbekistano:** Eugeno S. Perevertajlo, Abon. jashik 140, Poĉtamt, UZ-700000 Taŝkento, CIS, *esperuzo@mail.ru*